

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2010

4

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2010. №4 (186)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №4 (186).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 марта 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Прислано в Польшу.

Vole de cirkonstancoj ekstrema periferio de RF — la regiono de Kaliningrado — iĝis nun politika centro de la lando. Tiel asertis pasintsemajne la aŭtoritata moskva politologo N. Svanidze. Tiel opinias ankaŭ multaj politike aktivaj ruslandanoj tutvaste de la eksa Sovetio. La kaŭzo estas serio de amasaj mitingoj kiuj perturbis sufiĉe subite la stagnon de la patrolanda politika vegetado. Okazis io nekredbla, precipe por ekspertoj — amorfa, kvazaŭ duonmorta socia korpo sin streĉis kaj per drastaj spasmoj demonstris sian vivpotencon. Aŭ tio estis banala antaŭmorta konvulsio? La anticipa diagnozo ja estis preskaŭ fatala: vasta nekrozo aludis pri la fino de ĉiu konscienca socieco...

Oni pardonu al mi la inklinton al klinikmedicina terminaro, tiu tamen konvenas por nia temo. Temas do pri normo de reago. En la lastaj jaroj la socio ricevis aron de impulsoj kies iritkapablo ne lasas dubi. Kresko de impostoj, varkostoj, komunservaj pagoj, fermo de bibliotekoj, hospitaloj, lernejoj kaj hospicoj, embarasaj ŝanĝoj en la leĝaro, servaj reguloj ktp, ktp. Al tio aldoniĝis vera polica teroro, eĉ terorismo kiel rutina politiko. Lavango de skandaloj, kie policistoj murdis, torturis, amuzatakis homojn, ŝajnis nur malakrigi la percepton. La popolo silentis. Ĝenerale, ĝi silentas ankaŭ nun. Por la loĝantaro de la rusbaltaj enklavo oni havis eĉ pli. Luda zono estis anoncita okcidentparte, atomcentralo — oriente (tiu lasta — sen minimuma neceso por la regiono). Fine, drasta pligrandigo de aŭta impostado sur teritorio, kie la aŭto tro ofte estas kondiĉo de ekzisto.

Fakte, io estis moviĝinta funde del amastavolo. La bunta plekto de opoziciaj grupoj formis certan interkonsentan konsilion. La duonmilionaj Kaliningrado produktis kvinmilkaj dekmil-personajn mitingojn, la dekoble pli malgranda Ĉernjaĥovsk — trimilpersonan.

Mi skribas ĉi-liniojn antaŭ la 20a de marto. La protesta koalicio planis por tiu tago mitingon kun supozataj dudek mil partoprenantoj kaj la samaj sloganoj del demisio de Putin kaj radikala ŝanĝo de la socia politiko. La mitingo ne okazos, almenaŭ, kiel oficiale permesita aranĝo. Tiel decidis la lokaj aŭtoritatoj, kaj kun tio konsentis la populara heroo de la protesta epopeo aŭtokomerca entreprenisto K.Doroŝok. Tiu nova idolo del amaso klarigis al la ŝokita publiko, ke ekzistas fortega risko de kruela sangoverŝa atako de la flanko de la rabiiginta potenco: specialaj armeaj taĉmentoj jam venis aerveje kaj pretas aranĝi terurigan ekzemplan buĉadon.

— Krom tio, — aldonis trankvilige Doroŝok, — la regaj instancoj jam cedis al nia premado kaj konsentis plenumi niajn postulojn.

Ekzistas do sangosoifanta freneziĝinta ŝtatpotenco, kiu tamen jam pretas kviete obei la popolon.

Tute ne mirigas la bonkonduco de la mitinga gvidanto Doroŝok. Kiel sukcesa kaj racia entreprenisto, li sukcese kaj racie komercas per sia publika kapitalo. Iom mirigas la percepto de la amaso: ĝi ne rimarkis la kontraŭdiron en la cititaj argumentoj de sia heroo.

Alen Kris

 KrisUrsina@yandex.ru

Sur la kovrilo estas infanoj en la Esperanto-urbo Herzberg, kiuj uzas la internacian lingvon kaj *Skajpon* por interparolado kun siaj britaj samaĝuloj.

La urbo, en kiu ĉiam okazas io interesa

Herzberg am Harz estas la Esperanto-urbo, en kiu konstante io okazas. Verkante ĉi tiun artikolon, mi havis dilemon, ĉu priskribi ĉion, kio okazis dum la lastaj semajnoj aŭ elekti nur unu eventon? Kiun kriterion apliki?

Mi decidis limigi min nur al Esperantaj eventoj, strikte kunigitaj kun nia movado, ĉar la revuo bezonas spacon por aliaj temoj. Vi tamen povas ĉeesti multajn programojn en nia Esperanta urbo, ĉar la ĉefaj animantoj de la surloka movado, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar zorgis pri tio, ke la movada kalendaro estu plenplena ĝis la fino de la jaro.

Du tagojn, la 6an kaj la 7an de marto pasigis en Herzberg kvarmembra delegacio de pollandaj fervojistoj. Ili unuafoje vizitis la Esperanto-urbon. Mi akompanis ilin dum tuta ilia restado.

Sabate malgraŭ frosta vetero mi gvidis ilin en la urbo. Ili rigardis antaŭ ĉio la plej gravajn Esperanto-objektojn admirante penan laboron de lokaj esperantistoj. Ili ekvidis ŝildojn kaj informtabulojn en Esperanto. Grava travivaĵo por ili estis vizitado de la Esperanto-ekspozicio en la kastelo kaj fotado ĉe la Zamenhof-monumento (la unua en Germanio). Kutimo jam fariĝis vizitado de la ginsenga vendejo, do ankaŭ la pollandaj gastoj vizitis ĝin. Tie ili ne nur varmiĝis per ginsenga teo sed ankaŭ vigle interparolis kun la ĉarmaj gemastroj Harald kaj Jeong-ok.

Dimanĉe je la 10a horo en la urbo-domo atendis nin la urbestro de Herzberg, Gerhard Walter. La renkontiĝo pasis en ege amika etoso kun interparolado ĉefe en Esperanto. Wiesław Libner, prezidanto de PEFA, transdonis al la urbestro donacojn, interalie la belan libron *Reĝo Maĉjo la Unua*. Ankaŭ la gastoj ricevis donacojn de sinjoro Gerhard Walter, inkluzive de libro pri la historio de Herzberg. Dum ĉi tiu tago la delegacio vizitis ankaŭ la Esperanto-Centron, kie la gastigantoj, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, montris al ili belan bibliotekon kaj kelkajn gravajn rarajn Esperantajn kolektaĵerojn kaj ili klarigis al la gastoj la laboron de Interkultura Centro Herzberg (ICH).

Ĉeestantoj de la fervojista delegacio travivis neforgeseblajn momentojn en la plena Esperanto-etoso de la urbo kaj

ekkonis ege bonkorajn surlokajn esperantistojn.

Alia delegacio venis el la ĉefurbo de Hungario. Grupo de gimnazianoj el Budapeŝto vizitis sian partnerlernejon en Herzberg am Harz, pririgardis la urbon, la Zamenhof-ekspozicion en la kastelo, kie akceptis ilin la urbestro Gerhard Walter.

En la programo estis ankaŭ ekskursoj al la belaj, historiaj najbaraj urboj kaj amikaj kunvenoj kun la gastfamilioj. Tiu ĉi internacia interŝanĝo ekestis danke al la perada laboro de la Esperanto-instruistino Zsófia Kóródy, kiu kunligis sian iaman gimnazion kun gimnazio en la Esperanto-urbo.

Vespere merkrede, la 10an de marto, la Esperanto-klubo en Herzberg festis la centjaran jubileon de Esperanto en Herzberg. En la urba arkivejo estis retrovita arkivmaterialo pri tiu evento. La 10an de marto 1910 en la regiona gazeto *Kreis-Zeitung* aperis artikolo, kiu anoncis Esperanto-kunvenon en Herzberg am Harz.

En ĉi tiu merkreda renkontiĝo ekregis specifa etoso. Peter Zilvar vigle prezentis la historion de la Esperanto-movado en Herzberg, montrante kopion de la artikolo el *Kreis-Zeitung*, kaj poste ĉiuj ĉeestantoj ĉe manĝaĵ-plena tablo ĝoje babiladis kaj eĉ vortludis verkante historietojn el hazarde diritaj vortoj.

La sekvan tagon ni daŭrigis la feston, komune tagmanĝante en ĉina restoracio.



Małgosia Komarnicka
staĝantino en la Esperanto-urbo

La 11an de marto en la Herzberga bazlernejo Nicolai okazis interparolado per *Skajpo* inter Herzbergaj infanoj kaj iliaj geamikoj en la urbo Bar Hill en Britio. La virtuala renkontiĝo okazis kadre de la projekto Comenius. Grupoj de 6–9-jaraj infanoj per helpo de komputilo mallonge konversaciis, salutis unu la alian, ĉiuj prezentis sin kaj poste kantis. La infanoj atenteme rigardis siajn alilandajn geamikojn kaj estis feliĉaj ĉeestante tiumaniere preparitan lecionon.

Finante ĉi tiun raporton el la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, mi invitas ĉiujn viziti la multlingvan retpaĝaron kaj legi freŝajn novaĵojn pri la multflanka agado de Interkultura Centro Herzberg:

www.esperanto-urbo.de

Małgosia Komarnicka



Gastoj estas bonvenaj en la Interkultura Centro Herzberg



En la Pollanda parlamento

4 mar 2010 la vicprezidanto de la Pollanda Sejmo (la malsupera ĉambro de la Pollanda parlamento) Jerzy Szmajdziński akceptis en la parlamentejo esperantistojn: d-rino habil. Ilona Koutny, Francisko Witucki, Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyżak kaj Mariano Zdanowski. La vicprezidanton akompanis parlamentano Leszek Aleksandrak.

La geesperantistoj prezentis al la vicprezidanto la deziron, ke Esperanto ricevu statuson de lingvo, samranga kun la fremdaj lingvoj en la Pollanda edukad-sistemo.

La parlamentanoj kun bonvolemo rilatis al la propono. Ili sugestis, ke la Esperanto-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogon al la iniciato.

Eduardo Kozyra

KCE denove en ALTE-kunveno

25–26 feb 2010 okazis en Luksemburgo la dutaga kunvenaro de la laborgrupoj de la Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo (ALTE), kie Esperanto estas reprezentata de Kultura Centro Esperantista laŭ komisiono de la Esperanta Civito.

Prof-ino Meg Bianchi nome de KCE partoprenis en ĉiu laborgrupo: KEFR-manlibro, Kondutkodo, Migrintoj kaj Lingvotestado por specialaj celoj.

Apud la sep ĉefaj eŭropaj lingvoj (parolataj de pli ol kvindek milionoj en la mondo; sed esceptas la rusa), la minoraj idiomoj reprezentataj en la laborgrupoj estas ĉi-foje la bulgara, ĉeĥa, dana, esperanta, eŭska, galega, greka, kataluna, lecmberga, litova kaj nederlanda.

HeKo

Somerkursaro en januaro

Ĉi-jare la Aŭstralia Esperanta Somerkursaro (AESK 2010) okazis 10–23 jan en la Internacia Domo de la Universitato de Sidnejo. Ĉi tiu somerkursaro estis malgranda: ial la kutima nombro de studentoj kaj ekskursantoj ne aliĝis. Tio postulis iom da replanado, sed finfine la du semajnoj estis ĝueblaj kaj utilaj.

Sabine Trenner el Germanujo eskapis la teruran eŭropan neĝon por kunporti al nia suda kursaro viglajn lecionojn, internacian etoson, kaj multe da amuzo. Ŝi kaj la aŭstraliaj instruistoj Penny Vos, Jonathan Moylan, Jo Turvey, kaj Trevor Steele instruis ĉiun matenon, provizante klasojn por infanoj, komencantoj, komencintoj, kaj progresintoj/spertuloj. Kun Trevor tiuj la lastaj studis librojn de Jean Ribillaud kaj ŝatis la belan amuzan stilon.

Post matena laboro ekskurso okazis posttagmeze kaj dum la centra semajnfino. Ni vizitis la operan domon kaj piediris trans la havenan ponton. Ni ekskursis al la urbocentro, al diversaj plaĝoj, al la bestoĝardeno Taronga.

Dum la vesperoj ni diversmaniere amuzis nin. Nu, eble ni iomete plendis dum la luda vespero organizita de Sabine: ni devis kuri tien kaj reen por trovi numerojn kaj poste cerbumi kaj esti kreemaj. Sed mi devas konfesi, ke ni ĝuis la sperton. Ni aŭdis paroladojn kun bela kultura miksaĵo: sidnejano parolis pri sia urbo, ganaano parolis pri sia afrika lando; sed ankaŭ germano montris bildojn de Finnlando, aŭstraliano kunkonatigis informon pri Bruno Gröning el Germanujo, franca aŭstralianino vekis intereson pri japana aŭtoro.

Hazel Green

Elekta etoso sentebblas en UEA

14 membroj de UEA el 12 landoj konkursos pri la rajto reprezenti la individuajn membrojn en la Komitato de la Asocio dum la periodo 2010–2013. Ses el ili estos elektitaj kiel Komitatoj B per poŝta balotado, kiu komenciĝos en aprilo. Entute estis proponitaj 16 kandidatoj, sed du el ili ne sukcesis kompletigi siajn dosierojn ĝis la limdato fine de februaro. Ĉiu kandidato devis akiri subtenon de minimume dek membroj el tri landoj.

La granda nombro draste kontrastas kun la elektoj en 2007, kiam por sep lokoj aperis nur kvin kandidatoj kaj balotado ne necesis. Laŭ Osmo Buller, kiu pro ofico gvidas la proceduron, tio estas kuraĝiga evoluo. “Post periodo de ia apatio kaj senkonsileco membroj denove ekinteresiĝas pri la estonteco de UEA, kiu estas tiel bildodifina pri la tuta Esperanto-movado, — li konkludas. — Espereble tiu ĉi sukcesa fino de la unua etapo de la elektoprocezo plu akcelos densigon de la elekta etoso, kiun mi ja eksentas en la aero”.

Buller karakterizas la elekton de B-komitatojn kiel la plej grandskalan referendumon en Esperantujo: “Ĝi estas ankaŭ bonega maniero ankoraŭ pli proksimigi la membrojn al la Asocio, precipe nun, kiam pro la multeco de kandidatoj vere temas pri elektoj en la plena senco de la vorto.”

La kandidatoj estas: Marija Belošević (Kroatio), Paulo Branco (Belgio), Tomasz Chmielik (Pollando), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Probal Dasgupta (Hinda Unio), Johan Derks (Nederlando), Mark Fettes (Kanado), Lee Jung-kee (Korea Resp.), Jukka Pietiläinen (Finnlando), Barbara Pietrzak (Pollando), Josip Pleadin (Kroatio), José Antonio Vergara (Ĉilio), Amri Wandel (Israelo) kaj Wu Guojiang (Ĉinio).

Kvar kandidatoj (Belošević, Chmielik, Derks kaj Pietiläinen) estas nunaj Komitatoj B; ne rekandidatiĝis nur István Ertl, kiu unue elektiĝis en 2004 kun la plej granda nombro da voĉoj en la tiama balotado. Chrdle kaj Vergara estas Komitatoj A; Branco, Dasgupta, Pietrzak kaj Wandel Komitatoj C. Aparte rimarkinde estas, ke prezidanto Dasgupta, ĝenerala sekretario Pietrzak kaj estrarano Vergara prezentas sin por la prijuĝo de individuaj membroj. Tio ne venas kiel surprizo, ĉar sian intencon ili indikis jam en la Universala Kongreso en Bjalistoko.

GK UEA

IJK 2011: Unuafoje en Ukrainio

TEJO ĝojas anonci, ke la 67a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita en reta estrarkunveno.

La temo proponita por la kongreso estas *Stabila evoluo — nova koncepto por homaro*. La kongreso okazos en julio 2011 proksime de Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon kreas UkrEA (Ukraina Esperanto Asocio) kaj ULEJ (Ukraina Ligo de Esperantista Junularo).

Tio estos la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kieva akva rezervejo.

TEJO

Jubileo de Eroŝenko

En 1999 en Vladivostoko (Ruslando) ĉe la For-orienta Ŝtata Teknika Universitato komencis funkcii la Supera Popola lernejo (SPL), la unua popola lernejo en la Fora Oriento kaj Siberio por studentoj de la tria aĝo.

Ekde la komenco en SPL funkcias kurso de Esperanto. La studentoj lernas Esperanton dum sep monatoj kaj uzas ĝin: legas beletran literaturon, lernas kantojn, preparas koncertajn programojn, eldonas informajn bultenojn kaj artikolojn en la Internacia lingvo. Krome, la studentoj de Esperanto partoprenas la kunsidojn de la urba Esperantoklubo, renkontiĝas kun eksterlandaj gastoj kaj mem vizitas aliajn landojn. Ekzemple, 26 studentoj de SPL partoprenis en 2008 la Internacian Esperanto-seminarion en Harbino (Ĉinio). Ludmila Abisova, kiu finis kurson de Esperanto en 2002, nun mem instruas la Internacian Lingvon. Estas planataj seminarioj pri interŝanĝo de sperto inter similaj Superaj Popolaj Lernejoj en Ĉinio, Pollando, Slovenio, Italio kaj aliaj landoj.

La lastaj tri monatoj estis eventoplenaj: en decembro ni festis la 150-jariĝon de Ludoviko Zamenhof kaj en januaro la 120-jariĝon de Vasilij Eroŝenko, kiu kelkfoje vizitis Vladivostokon. 20 feb 2010 en la ejo de la Societo de Esploro de Amura Regiono, kie situas la Vladivostoka Esperanto-klubo *Pacifiko*, okazis publika kunveno pri Eroŝenko, al kiu kontribuis finintoj de la SPL, kiuj samtempe estas membroj de *Pacifiko*.

Ĉi-oktobre *Pacifiko* festos sian 30-jariĝon. Estus interese festi tiun jubileon kun novaj kaj malnovaj amikoj.

Aleksandr Titajev



Pastro Willibald Kuhnigk

Bibliaj Tagoj kun ADORU

3–7 mar 2010 okazis *Bibliaj Tagoj kun ADORU* en la kunveno Haus Mariengrund en Münster-Givenbeck (Germanujo).

22 personoj el Belgujo, Slovakujo, Nederlando kaj Germanujo sekvis la inviton de pastro Bernhard Eichkorn por studi bibliajn tekstojn, precipe la libron *Saĝeco de Salomono* kiel unu el la t.n. Duakanonaj Libroj. La studestro estis la benedikta pastro Willibald Kuhnigk, kiu lerte kaj tre profunde gvidis la partoprenantojn tra nekonata parto de Biblio.

Kompreneble ne mankis ĉiutagaj kantoj el *ADORU*, la ekumena Esperanto-Diservolibro, kiujn gvidis emerita eklezia muzik-direktoro Ernst Leuze kaj kantoro Stefan Lepping, kiu akompanis la kantadon kun sia gitaro.

Ĉiutage oni celebris sanktan meson kaj preĝis same el *ADORU* trifoje antaŭ la manĝotempoj konvenajn partojn.

Ne mankis duontaga ekskurso al la preĝejo “Sankta Josefo” en urbokvartalo Kinderhaus de Münster, en kiu troviĝas modernaj vitraj fenestroj kiel t.n. Krucvojo, kiuj bezonis lertan klarigon de Johannes Nordiek.

Karl Heinz Schaeffer

Printempa revido en Nienburg

En Nienburg 6 mar okazis unutaga renkontiĝo de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (EMAS). La partoprenantoj ĝuis la amikan kunestadon, babiladon, komunan tagmanĝon kaj partoprenis en gvidata urborigardado.

Al la faka programo kontribuis Interkultura Centro Herzberg per komputila prezentado de historiaj materialoj, bildoj pri Zamenhof kaj lia familio, kaj per raporto pri Esperanto-projektoj en lernejoj kaj en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz. Restis tempo ankaŭ por trovi interesaĵojn en la librobutiko kaj diskuti pri movadaj aktualaĵoj kaj planoj.

Anne Höpken

Ĉinio informas kaj instruas

Pekino. — 6 mar 2010 en la librovendejo de Haidian-distrikto Pekina Esperanto-Asocio (PEA) okazigis lecion, en kiu Hou Zhiping, eksdirektoro de *El Popola Ĉinio*, faris prelegon “Li Shijun (Laŭlum): genio de ĉina tradukista rondo”.

Laŭlum estas esperantisto-tradukisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA. Li esperantigis pli ol dek ĉinajn famajn verkojn, inkluzive de la klasikaj romanoj *Ĉe akvorando*, *Pilgrimo al la Okcidento*, *Romano pri la Tri Regnoj*, kaj per tio kontribuis al la Esperanta kaj ĉina kulturoj.

Ĉi tiu lekcio estas nur enkonduko al la sistemaj lekcionoj pri Esperanto de PEA. En la sekvontaj tri monatoj la asocio prezentos al la publiko sep pliajn lekcionojn pri Esperanto. En la lastaj jaroj PEA ĉiujare okazigis tiajn prelegojn en Pekino.

Baotou. — Danke al penado de la Esperanto-Asocio de Baotou, kvar Esperantaj kursoj fondiĝis en la Scienca kaj Teknologia Universitato de Interna Mongolio, en kiuj lernas sume 600 lernantoj en la komenco de la semestro. En la unua leciono ĉiuj sidlokoj en la klasĉambro estis okupitaj.

La kursoj daŭros 11 semajnojn. Liu Baoguo, kiu estas el Anhui-provinco kaj Chen De'en, kiu estas emerita instruisto de la angla lingvo, gvidas la Esperantajn kursojn. *Esperantaj Instruaj Materialoj* estas uzata kiel lernolibro.

ĈIIC

Aŭstrio: Nova poŝtmarko

Esperanto-Arbeitsgemeinschaft organizis internacian konkurson *Aŭstria poŝtmarko esperanto.net kun ponto*.

Venis 274 grafikaĵoj el Aŭstrio kaj eksterlando. La unuan premion gajnis Christiane Harm el Aŭstrio. Ŝi ricevis 100 ekzemplerojn de la marko.

La poŝtmarko aperis en marto 2010.

Walter Klag



Unufraze

★ Pozitiva raporto de la ĉefa hispanlingva novajagentejo EFE pri Eo en Ĉinio aperis 4 mar 2010 en multaj ĵurnaloj hispanaj k amerikaj. (Landa Agado)

★ En februaro Kuba E-Asocio kune kun MAS k *Le Monde Diplomatique*, havis komunan E-standon en la tradicia Havana Internacia Librofiro, kiu allogis pli ol 200 mil personojn. (Landa Agado)

★ 25 feb 2010 en la Muzeo de Nacia Liberigo de Maribor (Slovenio) ekfunkciis ekspozicio pri Hirosono pretigita de slovenaj k japanaj e-istoj. (*Verda Informilo*)

★ 20 feb 2010 en la Vojvodina Kultur-Instituto (Serbio), en kunveno de societoj pri lingvoj, literaturo k kulturo, reprezentanto de E-Instituto de Serbia E-Ligo parolis pri uzo de Eo por diskonigi verkojn el la serba lingvo k el minoritataj lingvoj en Vojvodino. (Boriša Miličević)

★ En la ĵus eldonita litovlingva libro *Juda kulturo: historio kaj nuntempo* (eld. Kronta) aperis artikolo de la Vilna e-isto Gediminas Degėsys *Zamenhof, Litovio kaj la ideo de mondlingvo* (p. 391-401) kun akompanaj fotoj. (G. D.)

★ 18–29 jan 2010 denove estis organizita ĉiutaga E-kurso en la Ĥemia Fakultato de la universitato UNAM (Meksiko) sub la gvido de Daniel Moreno. (Esperanto en Mexico)

★ 15 mar 2010 komenciĝis nova semestro de E-kurso en la Federacia Universitato de Cearao (Brazilo) en tri diversnivelaĵoj; la grupojn gvidas kvin E-instruistoj. (Universitato)

★ Je 21 mar 2010 al la 95a UK en Havano aliĝis 648 personoj el 51 landoj, plej multe el Francio 102, Japanio 60, Germanio 57, Brazilo 51, Italio 31, Nederlando 29, Belgio 24, Pollando 18, Britio 17, Danlando 15, Kroatio 15, Litovio 15 ... Usono 0. (uea.org)

★ 5 el la 15 membroj de la Akademio de Eo, kies mandato finiĝas ĉi-jare, decidis ne rekandidatiĝi: Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flávio Rebello, Trevor Steele; rekandidatiĝis dek elirantaj kandidatoj, kandidatiĝis ses neakademianoj. (*Heroldo de Esperanto*)

★ Svisa E-Societo nombris 149 membrojn fine de 2009. (*SES Informas*)

★ D-ro Mark Fettes estos la ĉefa preleganto de la 32a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA (17 apr 2010), en kiu prezentiĝos ankaŭ la emerita angla kantistino Fraŭlino Emily Barlaston. (GK UEA)



Hanojo: Ĉio por UK!

La duan martan dimanĉon Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) kaj la Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) organizis en Hanojo la dekan Printempan Renkontiĝon kun la slogano “Ĉio por UK 97 en Hanojo (2012)”.

La renkontiĝon partoprenis Nguyen Van Loi (prezidanto de VEA), Nguyen Phuong Mai, Thieu Quang Dieu (vicprezidanto), Nguyen Xuan Thu (ĝenerala sekretario), estraranoj de VEJO, multe da membroj de VEA, VEJO kaj de la Hanoja Esperanto-Asocio (HANEA).

La kunvenintoj bonvenigis la decidon de UEA pri la okazigo de la 97a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo (2012). Oni atente aŭskultis la oficialan leteron pri ĉi tiu temo de Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA.

Nguyen Van Loi prelegis pri niaj estontaj agadoj por la 97a UK kaj kuragiĝis ne nur membrojn de VEA sed ankaŭ la tutlandan esperantistaron. Li klarigis ankaŭ pri la rilatoj inter VUAO kaj VEA dum la organizado de la kongreso. La ĝenerala sekretario Nguyen Xuan Thu informis nin pri la agadplano 2010–2012 kiu celas prepari, gastigi kaj organizi la 97an UK. Poste Nguyen Hop, Nguyen Van Phach kaj Nguyen Van Ha alportis sian kontribuon per opinioj kaj spertoj por organizi la esperantistan mondkongreson post du jaroj.

La artaj programeroj, prezentitaj de la kultura-arta sekcio de HANEA, varmigis la etoson de la kunveno. La deka Printempa Renkontiĝo finiĝis per ĥora kantado de *Kiel estus Onklo Ho dum la ĝojplena tago de venko* en la vjetnama lingvo kaj en Esperanto.

Nguyen Phuong Mai

FEJO ne nur babilas

Ĉi-jara FEJO-semajnfino okazis 26–28 feb en Tampere, kie oni fondis novan junularan grupon en lasta aŭtuno. Plejparte temis pri agrabla kunestado kaj ĝenerala babilado, sed estis ankaŭ multe da programo.

Vendrede ni kune kuiris picon, luĝis kaj aŭskultadis muzikon. Sabate ni konatiĝis kun la urbo kaj ties historio. Nature ni ankaŭ pasigis iom da tempo en la loka Esperanto-klubejo *Nesto*. Plej grandan parton de la vespero kaj nokto ni saŭnis, babiladis kaj aŭskultadis koncerton de *Dolchamar*, kiu ludis akustike. Dimanĉo estis tradicie kunsidtago: unue estis la jarkunsido de FEJO (Finlanda Esperantista Junulara organizo) kaj poste la unua kunsido de la nova estraro.

Markus Sunela

Planedo: Kiulingve oni kantis?

La 21an de februaro en la Nacia Drama Teatro de Litovio okazis premiero de la spektaklo *Planedo* de la populara Ruslanda artisto Jevgenij Griŝkovec.

La reĝisoro kaj la plenuminto de la ĉefa rolo estas Algirdas Dainavičius. La komponisto Jonas Jurkūnas por la finalo komponis kanton en Esperanto *Vi estas maro* laŭ la teksto de William Auld. Pri la belsoneco de la teksto kaj pri la prononcado konsilojn donis Gediminas Degėsys. La ĉefan parton en *Planedo* kantis la fama litova kantistino Jurga Šeduikytė.

La komponisto skribis post la spektaklo: “Esperanto sonis kaj ege interesis ĉiujn. Ĉiuj eĉ demandis: en kiu lingvo oni kantis?”

Gemininas Degėsys

Ĉu kaj kiam EU aldonos aliajn lingvojn?

Dafydd ab Iago el Bruselo

En lingvaj aferoj Katalunio ofte montras la vojon al aliaj nacioj sen ŝtatoj. Ekde la restarigo de demokratio la malgranda kataluna nacio revigligas sian latinidan lingvon post jardekoj de premado fare de la hispania registaro sub generalo Franco. Lastatempe Katalunio puŝas por pli granda agnosko de sia lingvo je la eŭropa nivelo. Tio komenciĝis en 2005, kiam la irlanda aldoniĝis kiel oficiala EU-lingvo. La adapto de la eŭropunia regulo №1 de la 1958a jaro ne nur agnoskis la irlandan kiel oficialan lingvon, sed ankaŭ aldonis novan kategorion de “kun-oficialaj” lingvoj por la kataluna, eŭska kaj galega.

Katalunaj aktivuloj jam dum pli ol jardeko premas al la hispana registaro, ke ĝi insistu pri pli grava EU-statuso de la aliaj hispaniaj lingvoj: la eŭska, galega kaj kataluna. En 2005 EU rajtigis uzi en diversaj specifaj situacioj la tri nomitajn lingvojn. Tamen tiu agnosko venis ne danke al la hispania registaro, sed pro premo de galegaj, eŭskaj kaj katalunaj partioj. Ĝi ankaŭ ne estas tre granda donaco.

Laŭ la nuna hispania registaro, la statuso de kun-oficiala lingvo devas sufiĉi por la plendmaj parolantoj de la aliaj hispaniaj lingvoj. Tamen laŭ membro de la Eŭropa Parlamento, Oriol Junqueras, la hispania registaro ne plenumas eĉ la interkonsentojn kun la eŭropaj institucioj pri la uzado de la kun-oficialaj lingvoj. Junqueras, kiu organizis konferencon por premi por plena oficialigo de la nunaj kun-oficialaj lingvoj, ŝajne perdis ĉiun esperon je konstruiva aliro de la nuna hispania registaro.

Junqueras akuzas la hispanian registaron pri neplenumado de promesoj



Oriol Junqueras volas ke en la Eŭropa Unio estu pli multaj oficialaj lingvoj. (Foto de la Eŭropa Parlamento)

faritaj en 2005. Ekzemple, Hispanio ankoraŭ ne nomumis landan institucion respondecan pri tradukado. Hispanio ankaŭ ne plenumis la promeson traduki gravajn eŭropuniajn dokumentojn katalunen, eŭskan kaj galegan. Plie, la tuta sistemo — laŭ kiu leteroj estas resendataj inter Bruselo kaj Hispanio por tradukado — estas neefika kaj temporaba.

Junqueras, ano de la kataluna partio Respublika Maldekstro (Esquerra Republicana), membras en la Eŭropa Libera Alianco, kuniĝo de maldekstraj regionaj kaj sendependistaj partioj. La Alianco alvokas al plena statuso por la lingvoj kiel la kimra, skot-gaela, kataluna, eŭska, kaj ankaŭ la rusa, parolata de milionoj da homoj en la Eŭropa Unio. Endanĝerigitaj lingvoj, kiel la korsika kaj bretona, devas esti protektataj en EU.

Laŭ Junqueras, bona momento por aldoni kun-oficialajn lingvojn venos en 2012 aŭ 2013. Tiam Kroatio kaj Islando

povos plenumi ĉiujn kondiĉojn por aliĝi al la Eŭropa Unio, kaj do necesos oficialigi la islandan kaj la kroatan lingvojn. Tio ne nur aldonos du lingvojn al la ekzistantaj 23, sed ankaŭ povos malfermi la pordon al (ankoraŭ) neoficialaj lingvoj.

Laŭ Junqueras, katalunaj, eŭskaj kaj galegaj partioj devas insisti — kaj minaci ne apogi la centran hispanian registaron — pri la aldonado de siaj naciaj lingvoj. Tio ankaŭ malfermos, iom poste, la pordon por la aliaj kun-oficialaj lingvoj: la kimra kaj la skot-gaela.

La prezidanto de la Eŭropa Libera Alianco, Jill Evans el Kimrio, alvokas Eŭropon finfine ŝanĝi sian maldemokratian aliron al *neoficialaj* lingvoj. “Ni parolas ĉiam pri tio, kiel Eŭropo evoluigu pli bonan rilaton kun siaj civitanoj. Ne ekzistas pli bona metodo por komenci ol uzi la lingvojn kiujn popoloj vere parolas”, — ŝi diris. Aldone al la 23 oficialaj lingvoj, tio ankaŭ signifas paroli la neoficialajn lingvojn de ĉirkaŭ 40 milionoj da homoj en EU.

Dum konferenco en la Eŭropa Parlamento, Evans notis historian okazon por sia propra lingvo, la kimra. “Mi estas tre kontenta pro tio, ke mi estas la unua membro, kiu parolas kimre kun interpretado en la Eŭropa Parlamento. Tio estas historia tago, — diris Evans, prezidanto de la Eŭropa Libera Alianco, kiu ankaŭ kunlaboras kun la verduloj. — Nepras, ke la diskriminacio kontraŭ kelkaj lingvoj finiĝu, kaj estu egaleco por ĉiuj, kiuj vivas en la Eŭropa Unio”.

Flandra membro de la parlamento Frieda Brepoels, ankaŭ el la Eŭropa Libera Alianco, samopinias: “Nepras por la demokratia legitimeco de la Eŭropa Unio ke civitanoj povu sekvi la laboron de la institucioj en siaj propraj lingvoj. Nur tiel ili povos sin senti pli enplektitaj kaj nur tiel ili povas plene partopreni en la eŭropa projekto”.

100 je 100 kaj Esperanto-tabulludo

La 19an de majo 1910 okazis kunveno, dum kiu ĉirkaŭ 70 bjalistokaj esperantistoj decidis fondi la Societon Zamenhof. Bjalistoka Esperanto-Societo, okaze de tiu centa datreveno preparas festan aranĝon la 28–31an de majo 2010.

Unu el la plej gravaj ĝiaj punktoj estos malfermo de Esperanto-biblioteko. Al nia peto — donaci 100 librojn por la 100-a datreveno — respondis jam samideanaj asocioj el pluraj urboj. Por pluriĉigi la kolekton sekvaj donacoj estas bonvenaj. Lanĉita estas ankaŭ konkurso por ĉiuj, kiuj emas krei mem tabulludon. Gajnos la kreintoj de la plej ampleksaj kaj interesaj tabulludoj pri la temo de Esperanto kaj Zamenhof.

La verkojn ni atendas ĝis la 30a de aprilo 2010. Precizan regularon de la konkurso vi trovos ĉe:

<http://www.espero.bialystok.pl/eo/article,333,12,1.html>

Aliaj interesaj programeroj estas eldono de esperantlingva poemaro de bjalistoka poeto Jan Leończuk, urba strat-ludo laŭ la spuroj de Esperanto, ekskurso de esperantistoj al la ĝemela urbo Grodno en Belorusujo kaj zamenhofologia konferenco en la Universitato en Bjalistoko.

La programon kaj detalojn pri la festo vi trovos en nia paĝaro:

espero.bialystok.pl

Festu kun ni!

Przemysław Wierzbowski



Formi Esperanto-kulturmanaĝeroj

En la universitato de Szeged en septembro 2010 ekos faka formado de organizantoj de Esperanto-eventoj. La lingva preparo de la studentoj komenciĝis fine de februaro.

En la studprogramo de la Andragogia Instituto de la Universitato de Szeged montriĝis eblo je universitatnivela trejnado de Esperanto-kulturmanaĝeroj.

La nova studformo estas unujara, oficiala universitata kursaro. En la tria studjaro de la Andragogia Fakoj unu grupo de la studentoj (ĉ. 15-20 personoj) havos eblon specialiĝi pri organizado de Esperanto-eventoj. La celoj de la nova fako estas: instrui al la studentoj la internacian lingvon je almenaŭ B2-nivelo kaj partoprenigi ilin en kiel eble plej multe da Esperanto-aranĝoj, por ke laŭ propraj spertoj kaj la lernitaj fakaj konoj ili povu prepariĝi je altnivela kaj profesia organizado de aranĝoj kaj programoj de la Esperanto-movado.

Por la lingva preparo ni petis helpon de Katalin Kováts, laŭ kies konsilo la lingvan preparlaboron de la studentoj ni komencis jam duonjaron antaŭ ol la studoj oficiale ekos. Kadre de tio 12 studentinoj partoprenis 3-tagan intensan semajnfinan kurson (24 lecionoj po 45 minutoj) sub la gvido de Petra Smidéliusz. La studentoj ĝuis kaj pozitive akceptis la baze rektmetodan instruadon de la movade aktiva juna lingvo-instruistino, pli-malpli samaĝa kun ili. Ŝi instruis la bazajn gramatikajn kaj leksikajn elementojn de la lingvo, enkondukis la studentojn en la movadhistorion de la Internacia lingvo kaj gustumigis al ili ĉefe la junularajn aranĝojn. La partoprenintoj estis preparitaj memstare plulerni, uzante www.lernu.net kaj aliajn retajn eblojn, vortarojn, komunikkanalojn.

Ekde septembro de 2010 la grupo havos Esperanto-lingvokurson sub la gvido de Ildikó Ladányi. Kun la organizanto de la projekto, Edit Újvári, la grupo lernos ankaŭ pri movadhistorio kaj partoprenos kurson de Petra Smidéliusz pri faka komunikado per Esperanto. La grupanoj studos hungare ankaŭ fakajn studobjektojn kadre de la kursprogramo de event-organizado.

Edit Újvári

10 mar 2010 post longa malsano en Kaŭno forpasis
Ĉeslovas Liubomiras Tručionis (1937–2010)

fakulo pri grundplibonigo, esperantisto ekde 1959, li aktivigis en 1988 kaj iniciatis en 1989 fondon de la E-klubo *Revo* (Panevėžys), kiun poste li dufoje prezidis. Li kunfondis la E-eldonejon en Panevėžys, tradukis kaj redaktis, eldonis la informilon *Lumturo*.

Ni funebras kaj kondolencas.

Arbitracia komisiono estas necesa

Komitatano Z en *Perdita honoro de iu Gbeglo Koffi* (LOdE, 2010, №3) paroligas min sube:

Se ĝis nun mi persistas en mia batalado kontraŭ Osmo Buller kaj Renato Corsetti, oni do komprenu, ke mi defendas mian senkulpecon. Kio solvos la problemon, tio ne estas, ke Osmo Buller kaj Renato Corsetti uzu sian famon en UEA-medio por mortigi en Esperantujo, kiel Osmo Buller asertis tion al Renato Corsetti jam en novembro 2000 “Ni ĉion faru, ke tiu ulo (tiel ili nomis min) ne havu estontecon en Esperantujo”. Ne tiel oni traktu la problemon inter ili kaj mi. Kion oni faru, tion mi jam multfoje proponis, sed ili rifuzis: starigi arbitracian komisionon, kiu zorgu pri la afero. Nur tio solvos la problemon. Sen tio, ili daŭre ekspluatos UEA-membrojn por premi ĉiam la malplej fortan, sed ĝis kiam?

Estas vero, ke mi pli silentas ol parolas ĉie do ankaŭ en ĉiuj kunvenoj, kiujn mi partoprenas. Estas vero, ke mi dormetas en kunvenoj, ĉar ĉiam miaj noktoj estas tro mallongaj. Estas vero, ke mi aspektas kamparane ĉie. “Vesto homon prezentas” kaj “Kapuĉo monaĥon ne faras”. Diru, ke la kvint-esenco de miaj aferoj estas *mono*, estas neĝuste. Kio ĉe Osmo Buller kaj Renato Corsetti. Tie ĉi mi ne volas reiri al la kaŝaj manipuladoj de Osmo Buller kaj Marvin Stanley pri mono de UEA, kaj pri fingrumado de Renato Corsetti en la monujoj de UEA-fondaĵoj.

Mia salajro kiel instruisto ebligas al mi vivteni min kaj mian familion: nun unu edzino, unu filo kaj unu filino. Per ĝi mi ne povas havi propran domon. Kiun mi havas nun, tiu estas donaco al mi, kaj ĝi estas en la stato en kiu ĝi estis ĉe la dono. Mi iam alpruntis en banko kaj aĉetis motorciklon por fari motortaksion cele gajni iom da mono, sed pro mia amo al Esperanto, mi vendis ĝin, kaj per la mono konstruigis ĉambreton en mia domo, ke Afrika Oficejo povis trovi lokon dum kvar jaroj. Mi respektas en homo ne riĉaĵon, sed bonan konduton, kaj ĝuste tio iel mankas ĉe Renato Corsetti kaj Osmo Buller.

Osmo Buller ĝis 2005 neniam interesiĝis pri Afrika Agado, kaj eĉ nun plu estas tiel. Por li Afrika Agado ne estas rendimenta al UEA. Kiel povis li ion scii pri la starigo de Afrika Oficejo en Togolando, kaj ĝin gvidi? Nur Hans Bakker kaj mi ĉion iniciatis. Kiam ĉio estas preta, venis Osmo por akapari ĝin kaj eĉ Instituton Zamenhof. Neniam al tio oni cedu, kaj tia submetiĝo al Osmo Buller tute ne eblos. Afrika Agado sendependiĝu, ĉar estas tro da ludoj per ĝi.

Feliĉe multaj afrikaj esperantistoj nun komprenas ĉion kaj disiĝas de la politiko de UEA-gvidantoj en Afriko. La maro da intervenoj pri la unuiĝo de afrikaj esperantistoj devus ebligi al UEA-gvidantoj revizii sian konduton al afrikaj esperantistoj, ankaŭ kiuj estas homoj tre kapablaj, kompetentaj sur multaj terenoj. Estas certe, ke la nunaj movoj de afrikaj esperantistoj por la unuiĝo de afrikaj esperantistoj donos grandegajn sukcesojn al Afrika Agado. Eksterafrikanoj nur observu la iradon de la aferoj, ne provante ion sapei, ĉar neniu povas malhelpi malsupren veni lavangon.

Fine, UEA-gvidantoj konsideru mian proponon pri starigo de arbitracia komisiono, ke la problemo inter Osmo Buller/Renato Corsetti kaj mi estu traktita. Triumfos nek mi nek ili sed la vero. Sukcesu ne kontraŭhomaj agadoj, sed klopodoj bonaj por la progreso de la homaro. Esperanto sukcesu ĉiam, ankaŭ en Afriko.

Gbeglo Koffi

Kiel efike retumi?

Retumilo estas programo, sen kiu la uzado de interreto apenaŭ estus imagebla. Ni uzas ĝin por serĉado de informoj en la reto, por vizitado de niaj ŝatataj paĝaroj, por kontrolado de retroŝto k.s. Por multaj uzantoj, kiuj havas malgrandan sperton pri komputiloj, la vortoj “interreto” kaj “retumilo” ofte estas sinonimoj. Oni eĉ ofte ne konscias, ke temas nur pri simpla programo, kaj ke ekzistas pluraj specoj de tiuj programoj. Oni povas elekti tiun retumilon, kiu plej bone kovras bezonojn de “sia posedanto”. Inter ret-uzantoj ofte aperas disputoj pri tio, kiu retumilo estas la plej bona, rapida kaj sekura. Ni preparis en tiu ĉi artikolo etan superrigardon pri la plej konataj ekzistantaj retumiloj kun kelkaj niaj komentoj kaj sugestoj:



Google Chrome

Kreanto: Google

Retejo: <http://www.google.com/chrome>

Tio estas unu el la plej junaj retumiloj. Unua test-versio de tiu retumilo aperis en la jaro 2008. Ĝi estas senpaga, havas malfermitan kodon kaj ĝi estas unu el la plej rapidaj retumiloj. La programo unue aperis por Vindozo kaj pro tio ĝi plej bone ĝis nun funkcias ĝuste en tiu operaciuma sistemo. Tamen lastatempe komencis evolui ankaŭ versioj por Linukso kaj Mac OS, sed tiuj programversioj estas ankoraŭ en “beta”-versio. La funkciaron de la programo eblas pligrandigi pere de aldone instaleblaj programetoj. La programo estas tradukita jam al multegaj lingvoj, sed Esperanto bedaŭrinde daŭre mankas en la listo.



Internet Explorer

Kreanto: Microsoft

Retejo: www.microsoft.com/windows/internet-explorer

La plej populara retumilo en la mondo, kiun oni komencis ellabori en la jaro 1995. La programo iĝis populara ĉefe pro tio, ke ĝi ĝis nun estis parto de Vindozo — la plej populara operaciuma sistemo. Por uzado de la programo oni kutime bezonas aĉeti Vindozon. La funkciaro de la retumilo en lastaj versioj estas plilarĝigebla per instalado de aldonaj programetoj. La ĉefa problemo estas, ke ankoraŭ multaj ret-uzantoj daŭre uzas tre malnovajn versiojn de tiu ĉi retumilo, kiuj enhavas multe da sekur-truoj kaj malbone subtenas la nunajn normojn, kiuj estas uzataj por kreado de ret-paĝaroj. Pro tio tre ofte oni ne povas ĝui ĉiujn funkciojn de nunaj modernaj kaj interaktivaj paĝaroj. Explorer estis dum longa tempo ja plej uzata kaj konata retumilo, aliflanke ankaŭ unu el malplej sekuraj kaj rapidaj. Ankaŭ pro tiuj ĝiaj ecoj multaj homoj “migris” el ĝi kaj ekuzis aliajn retumilojn, ĉefe Firefox.




Mozilla Firefox

Kreanto: Mozilla Foundation

Retejo: www.mozilla.com/firefox

Tio estas senpaga retumilo, kiu estas ellaborata ekde la jaro 2004. La retumilo funkcias en ĉiuj operaciumaj sistemoj kaj estas tradukita al multegaj lingvoj, interalie ankaŭ al Esperanto! Dank’ al ekzisto de amasego da aldone instaleblaj programetoj, tiu ĉi retumilo estas konata

kiel la plej agordebla retumilo. Ĝi estas ankaŭ verŝajne la plej “Esperanta” retumilo kaj ne nur pro ekzisto de la traduko al Esperanto. Pere de aldone instaleblaj programoj vi povas aranĝi, ke dum tajpado de tekstoj en tiu ĉi retumilo, ĝi kontroli ĝustecon de entajpataj Esperanto-vortoj. Ekzistas ankaŭ programetoj, pere de kiuj eblas pli facile meti supersignojn en la paĝaroj.... Ĉu verki pli...



Opera

Kreanto: Opera Software

Retejo: <http://www.opera.com/browser/>

Unue aperis en la jaro 1994. Longan tempon tiu ĉi retumilo estas pagenda, sed ekde la jaro 2005 preskaŭ ĉiuj versioj de tiu ĉi programo estas disvastigataj tute senpaga. La retumilo funkcias en ĉiuj operaciumaj sistemoj kaj haveblas en multaj lingvoj. Ĝi same kiel la aliaj supre priskribitaj retumiloj subtenas instaladon de aldonaj programetoj, kiuj signife pligrandigas funkciaron de la programo. Ekzistas versioj de tiu ĉi retumilo por poŝtelefonoj, poŝkomputiloj ks.



Safari

Kreanto: Apple Inc.

Retejo: www.apple.com/safari/

Unue la programo estis ellaborita por la operaciumaj sistemoj de Makintoŝo: Mac OS X, sed nuntempe ekzistas versioj ankaŭ por Vindozaj komputiloj. La tuta aspekto kaj ĉiuj elementoj estas faritaj en la stilo de la operaciuma sistemo Mac OS X. La programo estas tute senpaga kaj ankaŭ subtenas instaladon de aldonaj programetoj.

Do, kiel videblas, la retumiloj estas diversaj, same kiel iliaj funkcioj. Ne estas celo de la artikolo igi legantojn uzi iun specifan retumilon — nur doni bazajn faktojn pri la plej konataj, por povi decidi, ĉu daŭre uzi sian malnovan (kaj eble ne sufiĉe sekuran, rapidan...), aŭ eble instalati novan, kiu povas pliefikigi laboron kun interreto. La aŭtoroj de la artikolo mem uzas plejparte Firefox pro tio, ke ĝi tiom bone kongruas kun Esperanto, kaj Chrome pro ĝia rapideco kaj stabileco. Ajnokaze sendepende de tio, kiun retumilon vi plej ŝatas, ni rekomendas, ke vi ne forgesu ĝisdatigi vian retumilon al la plej lasta versio. Tiamaniere vi povos eviti amason de diversaj problemoj, interalie ankaŭ pri sekureco.

Jevgenij Gaus, Peter Baláz

KCE: Seminario pri informado

Lu Wunsch-Rolshoven gvidis semajnfino pri informado en Kultura Centro Esperantista, kiun 27–28 feb 2010 partoprenis kadroj kaj aktivuloj el Francio, Italio, Svedio, Svislando. Unu el ili, sen. Bertil Nilsson, tiel priskribas la aranĝon:

“Ĉu informi por varbi varbanton por nia laboro plibonigi la mondon? Aŭ informi por doni al la publiko ŝancon riĉigi sian vivon per esperanto? Dum du tagoj Wunsch-Rolshoven, gvidanto de EsperantoLand, montris kiel la du celoj postulas malsamajn alirojn kaj donas grave diferencajn rezultojn. Aldone la partoprenintoj ricevis multajn praktikajn konsilojn”.

La trejnado precipe enfokusigis al la intervjuado. La debato estis vigla kaj reciproke stimula.

HeKo

Vera trezoro de oficista saĝo: la Varsovia cenzuristo M.F. Zamenhof

de Aleksander Korĵenkov

I.

En la marta *Ondo* mi rakontis pri la ŝtatoficista kariero de Mark Fabianoviĉ Zamenhof en la Ministerio pri Popola Klerigado de Ruslando. Ĉi-foje temos pri lia servado en la Ministerio pri Internaj Aferoj.

Privat nur mallonge skizis ĝin en sia ĉarma stilo sen iuj ajn faktoj:

Baldaŭ vidis la gefiletoj, ke la patro jam aldonis novan laboron al sia kutima korektado de knabaj skribaĵoj: akceptinte plian cenzuran oficon, li ĉiuvespere sub la lampo malligis dikan amason da fremdaj gazetoj, kaj, prenante ruĝan kraĵonon en la mano, tralegadis ĵurnalon post ĵurnalo. Tian plian oficon oni komisiis al li pro lia rimarkinda kono de fremdaj lingvoj.¹

Pro tio en *Homarano*² la cenzurista agado de M.F. Zamenhof estis prezentita surbaze de:

— *La cenzuristo Marko Zamenhof de Naĥum Sokolov*³,

— *La mistero pri la cenzuristo Marko Zamenhof* de Naftali Zvi Maimon⁴
(ambaŭ represitaj kune⁵ dudek jarojn post la unua aperigo),

— *Marko Fabianoviĉ Zamenhof* de Adolf Holzhaus⁶,

— la rememoroj de Maks Levite, kiuj aperis en la tradukoj de Josef Kohen-Cedek⁷, Natan Ĥavkin⁸, sed plej frue kaj plej plene sen mencio pri la tradukinto⁹.

Mi prenis el ĉi tiuj “klasikaj” tekstoj plurajn informojn ĝustajn kaj erarajn. Nun, post la arkiva esplorado en Peterburgo, mi kaptas la okazon por korekti erarajn kaj aldoni novajn informojn.

Unue ni vidu, kie kaj kiam cenzuristis la patro de d-ro Esperanto.

II.

Kadre de la reformoj en la 1860aj jaroj ĉiuj cenzuraj oficejoj en Ruslando

el la Ministerio pri Popola Klerigo estis transdonitaj al la Ministerio pri Internaj Aferoj, kies kerno estis la polica aparato. La ĉefa cenzura organo iĝis la Ĉefa Administrejo pri Presaferoj (ĈAP) en Peterburgo, al kiu subiĝis lokaj cenzuraj komitatoj.

La Varsovia Cenzura Komitato (VCK)¹⁰ estis establita la 17an de septembro 1869 laŭ la ukazo de Aleksandro surbaze de la cenzura oficejo kaj la gazetfako, kiuj funkciis sub la egido de la Varsovia Kleriga Departemento kaj Konsilio de la Popola Klerigo de Pollando. VCK ekfunkciis en februaro 1870 kun Viktor Jakovleviĉ Fuks (1829–1891) kiel provizora prezidanto, kiun unu jaron poste anstataŭis Nikolaj Ivanoviĉ Ryĵov (1831–1905) restinta en ĉi tiu posteno dum preskaŭ 17 jaroj.

En VCK, kies oficejo troviĝis en alo de palaceto en la strato Miodowa №13, laboris ĉirkaŭ dek personoj. Ili okupiĝis ne nur pri la rutina prespermesado kaj disvastigpermesado de ĉiuj lokaj presaĵoj, kio estis la ĉefa tasko de la ordinraj cenzuraj komitatoj. Inter la laborobjektoj de VCK estis ankaŭ surscenigitaj dramoj (krom la ruslingvaj spektakloj, traktataj en ĈAP), eksterlandaj gazetoj abonataj tra la Varsovia poŝtejo, aliaj presaĵoj ricevataj poŝte, prelegoj kaj oracioj, mapoj, bildekspozicioj — en la dek Pollandaj gubernioj de Ruslando.

Ne facila estis la cenzurista laboro. Ĥristofor Vladimiroviĉ Emmauskij (1851–?), kiu en 1876 eklaboris en VCK kiel subcenzuristo kaj poste (1899–1911) estis ĝia prezidanto, priskribis en siaj rememoroj la laboron de la Varsoviaj cenzuristoj:

Vere teruraj estis la kondiĉoj, en kiuj devis labori ĉi tiuj malfeliĉaj ŝtatoficistoj. De la mateno oni devis trarigardi presprovaĵojn de lokaj polaj periodaĵoj ĉiutagaj kaj ĉiusemajnaj, legi presotajn manuskriptojn kaj eksterlandajn librojn, kaj vespere — suspektindajn revuojn kaj ĵurnalojn, kiuj

estis disportataj al la loĝejoj de la cenzuristoj de la 17a ĝis la 19a horo kaj estis reprenataj la sekvan frumateno. Tio daŭris dum la tuta jaro, inkluzive de la unua Paska tago. Aldoniĝis ekstrema harfendemo de la loka estraro, kiu ĉikane kroĉiĝis ne nur al artikoloj kaj verkoj, sed eĉ al apartaj bildoj, etaj informoj kaj versaĵoj, kaj preskaŭ al apartaj frazoj. La gazetara fako ĉe la kancelario de la Varsovia ĝenerala gubernatoro tiutempe okupiĝis krom pri tradukado de artikoloj en polaj revuoj kaj ĵurnaloj, kiuj povis interesi la estron de la lando, ankaŭ pri serĉado de tute etaj eraroj de Varsoviaj cenzuristoj, kiuj estis registrataj en speciala kajero kaj raportataj al la estraro, kiu siavice riproĉis la prezidanton de la Komitato, kaj tiu riproĉis la cenzuristojn. Ĉi tiuj kompatinduloj, kiuj ĉiam estis sub la impreso de riproĉoj, atentigoj kaj skoldoj, preskaŭ perdis la racion kaj faris absurdaĵojn, pri kiuj mi sube rakontos. Krom la ĝenerala gubernatoro super la Komitato pendis la Damokla glavono en la formo de la Ĉefa Administrejo pri Presaferoj, al kiu pri ni plendis diversaj potenc-havantoj, iukiale malkontentaj pri niaj agoj.¹¹

Ĉi tiu priskribo de la cenzuristoj ne kongruas kun la kliŝa imago pri severaj ĉiopovuloj. Ĉar la cenzurista laboro estis ne nur teda kaj “danĝera”, sed ankaŭ malbone pagata, la cenzurejestroj malfacile povis trovi kompetentulon, kiu konsentus pri longa laboro en tiuj kondiĉoj.

III.

Ryĵov, kiel ĉiu gvidanto, deziris havi bonajn oficistojn en sia komitato. La 4an de marto 1883 li sendis oficialan leteron al la literaturisto kaj historiisto

Jevgenij Miĥajloviĉ Feoktistov (1829–1898), kiu ekde la jarkomenco ekoficis kiel la estro de ĈAP.

Ĉi tiu letero estas la unua dokumento en la “Afero” de Zamenhof en la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (RGIA) en Peterburgo. En ĝi Ryĵov petis la ĈAPEstron permesi al Mark Fabianoviĉ Zamenhof eklabori en VCK kaj argumentis jene:

... li, kiel ĝenerale klera homo, kaj kiel konanto de la lingvoj rusa, pola, franca, germana kaj hebrea, povas doni gravan utilon al la Komitato en la sfero de trarigardado de la polaj, francaj kaj germanaj eksterlandaj periodaĵoj, kaj poste ankaŭ kiel plenumanto de la devoj pri cenzurado de judaj presaĵoj. <...> La instruista ofico de s-ro Zamenhof plene ebligas al li uzi sian tutan posttagmezan tempon al cenzurraj taskoj. Doninte al li por prova trarigardado kelkajn plej seriozajn germanajn gazetojn, mi eĉ pli certe konvinkigis, ke s-ro Zamenhof povos esti tre utila persono en cenzurado.¹²

La letero estis ricevita la 7an de marto 1883, kaj jam la 12an de marto la ministro pri internaj aferoj grafo Dmitrij Andrejeviĉ Tolstoj (1823–1889) subskribis dokumenton¹³ laŭ kiu al la instruisto de la germana lingvo en la Varsovia 1a Vira Progimnazio Zamenhof estis asignita jarsalajro 700 rubloj pro lia cenzurista laboro en VCK. La 15an de marto 1883 Feoktistov komunikis ĉi tiun decidon al Ryĵov¹⁴.

Ĉi tiu “malkovro” montris, ke eraris Holzhaus, skribinta, ke Zamenhof eklaboris kiel “cenzuristo por hebreaĵoj kaj judaj gazetoj” en 1878¹⁵; kaj mi ripetis tion en *Homarano*, kvankam mi tre bone konis la Waringhien-an datigon:

Li kronis tiun promocion, atingante en 1882 la oficon de regna cenzuristo super la hebreaĵoj kaj gazeto en Varsovio¹⁶.

Decidigis min akcepti la Holzhaus-an version, sed ne la Waringhien-an, tio, ke ankaŭ Zofia Banet-Fornalowa, kiu, laŭ mi, devis kontroli ĉi tion en Varsovio, notis, ke “la tre respondeca kaj sindona patro akceptis en 1878 novan laboron de cenzuristo por Varsovio de hebreaĵoj kaj judaj gazetoj kaj libroj”¹⁷.

Nur post la prespretigo de *Homarano*, mi konatiĝis kun la kvara volumo

de la serio *Cenzuro en Ruslando: Historio kaj nuntempo*, en kiu oni povas legi ke Zamenhof laboris ĉe VCK ekde la 12a de marto 1883 ĝis la 30a de septembro 1888¹⁸.

Ekde la fondo de VCK la verkojn en la judaj lingvoj en Varsovio cenzuris Vladimir Vasiljeviĉ Fjodorov (ankaŭ Feodorov, 1818–1879), antaŭ la kristanigo nomata Cvi-Hirŝ Grinbaum. Laŭ la cititaj verkoj de Sokolov kaj Emmauskij, kaj ankaŭ laŭ la disertacio de Eljaŝeviĉ¹⁹, li estis tre klera. Fjodorov okupis la oficon de ĉefcenzuristo, traktante ĉiujn hebreaĵojn kaj judajn presaĵojn kaj ankaŭ librojn en la pola kaj germana lingvoj. Fjodorov laboris ĝis la 3a de novembro 1877; post lia ekŝigo la judajn eldonaĵojn cenzuris alia kristaniginta judo Isahar (aŭ Berngard) Cimmerman (aŭ Zimmermann, 1813–1885), kiu mortis la 5an de decembro 1885.

La 10an de decembro 1885 Ryĵov sciigis la morton de Cimmerman al Feoktistov kaj, referencinte al sia letero de la 4a de marto 1883, el kiu ni jam citis, petis enoficigi la kunlaboranton de VCK s-ron Zamenhof kiel cenzuriston pri la eldonaĵoj en la juda lingvo (evidente, en la du judaj lingvoj: la jida kaj la hebrea) kun la suma salajro 1200 rubloj jare. Li aldonis:

... s-ro Zamenhof, laboranta en la Komitato ekde la 15a de marto 1883, per sia persisto kaj per tute ĝusta kompreno pri la devoj, komisiitaj al li, plej bone rekomendis sin, kio servas kiel [nelegebla vorto] garantio pri tio, ke li kun plena konscienco rilatos al la devoj de la juda cenzurado, kiu, kiel konate, pro la ekskluziva specialeco kaj karakteriza aparteco, postulas pruvitajn moralajn kvalitojn de la persono, al kiu ĝi estas konfidata.²⁰

La oficejo de la Varsovia Cenzura Komitato troviĝis en alo de la *Ĉefepiskopa palaco* (str. Miodowa 13), kies ĉefkontsruaĵon okupis la Varsovia romkatolika episkopo. En la sama alo estis ankaŭ la loĝejo de la prezidanto de VCK.



La propono de Ryĵov estis akceptita, kaj la 27an de decembro 1885 Zamenhof ekplenumis la kromajn taskojn de la juda cenzurado ĉe VCK. Al lia antaŭa 700-rubla salajro estis aldonita la 500-rubla salajro de Cimmerman, kaj ĉi tiel lia suma salajro ĉe VCK iĝis 1200 rubloj jare.

IV.

Emmauskij, kiu priskribis sufiĉe detale la laboron de Fjodorov kaj eĉ aldonis anekdotecajn detalojn pri lia labormaniero, tute ne menciis pri Cimmerman kaj Zamenhof, supozeble ĉar tiuj ne plentempe laboris en VCK. Ankaŭ Eljaŝeviĉ skribas pri li nenion en sia 792-paĝa libro *Registara politiko kaj judaj presaĵoj en Ruslando, 1797–1917*, kaj pri Fjodorov li skribis kiel pri persono, ne loke sed Ruslande eminenta.

Sed Naĥum Sokolov, kies gazeton *Hacefira* Zamenhof ĉiutage cenzuradis, ne povis silenti pri li. Komparante la tri cenzuristojn de *Hacefira*, li skribis, ke la hebreaĵoj de Zamenhof “ne sufiĉis por esti cenzuristo kiel Feodorov, sed ili estis tro multaj por esti cenzuristo kiel Zimmermann”, kaj daŭrigis:

Liaj principoj ne akordiĝis al la reguloj de la malnova cenzuro, kiu ĉiumomente ŝanceliĝis kaj ŝanĝiĝis; lia precizeco kaj rigoreco kaŭzis murmuradon kaj plendojn. Kaj lia lojaleco, patriotismo kaj singardemo kontraŭ la registaro ne sufiĉis, por eviti konjektojn kaj suspektojn. Li forstrekis ĉion forstrekeblan kaj ĉion neforstrekeblan. Tiutempe mi jam skribis la plimulton de la gazeto, ne subskribinte per miaj komercaj literoj, kaj — pardonu al li Dio — plej ofte mi devis skribi du-tri fojojn, la unuan

fojon aŭ la duan al la paperkorbo, ĉar li ĝin malaprobis, la trian, al la presejo. Plej rigora li estis kontraŭ la artikolaro: “Observanto super la domo de Izrael”. Jam la titolon li rigardis kiel arrogant-econ kaj malrespekton kontraŭ la cenzuro. Mi nun ne povas konstati, ĉu mia opinio estis ĝusta aŭ malĝusta, sed dum jaroj mi havis la firman konvinkon, ke ĉion altvaloran li forstrekas kaj ĉion malklaran li aprobas. Mi ĉiam devis danci sur ŝnuro, teksti maldikajn fadenojn, por interne de la fadenbulo kaŝi la kernon de la ideo, kiun mi preferus diri — eĉ tiam, en la tempo de la bibli-fraz-aĵa esprimmaniero — plej simple; sed tion la cenzuro ne allasis.

Se s-ro Zamenhof ne estus vera trezoro de oficista saĝo, kiel li fakte estis, tiam li eĉ unu monaton ne okupus la cenzuran oficon. Ke li ĝin multajn jarojn okupis, tio estis miraklo de lia mirinda talento — per tiu miraklo li staris, kaj pere de ĝi li daŭre starus, se tio dependus sole de ĉi tiu oficejo. Sed super li ja estis kontrolanto, kaj tiu lin multe ĉikanis, ĝis li sukcesis forpuŝi lin de lia ofico.²¹

Temas pri tio, ke krom al la estroj de siaj cenzuraj komitatoj, la lokaj judaj cenzuristoj estis respondecaj ankaŭ al la judaj cenzuristoj ĉe ĈAP, kies tiutempan nomliston ni prenas el la libro de Eljaŝeviĉ: Pavel Margolin (15 feb 1875 – 10 apr 1887), Naum Rappoport (1 feb 1883 – 1 feb 1891), Nikandr Zjusmen (10 apr 1887 – 31 okt 1890).²² Ili (same kiel ilia antaŭulo, la fama Jakov Aleksandroviĉ Brafman) estis judoj baptitaj rusortodokse.

La kontrolanto, aludita de Sokolov, estis Nikandr Vasiljeviĉ Zjusmen (ne Zusmen, kiel Sokolov skribis; ruse Зюсмен, sed ne Зусмен). Oni konas malmultajn faktojn el lia biografio, krom tio ke li estis judo, akceptinta la rusortodoksan eklezion, fininto de la kristana seminario en Kazano. Eljaŝeviĉ skribas pri liaj rilatoj kun Rappoport kaj pri la skandaleca fino de lia nelonga cenzurista kariero kaj referencas al la artikolo de B.Kac²³, kiun mi ne sukcesis trovi.

Naĥum Sokolov en sia citita (kaj citota) verko skribis pri Zjusmen tre negative. Sed laŭ Josef Ŝemer²⁴, Ŝmuel

וואַרשאָ . נעים לנו להודיע כי בין השרים והפקידים ונכבדי המדינה אשר זכו לאותות הכבוד מאת הממשלה הרוממה בארצנו בראשי השנה הזאת למספר האורחים, וזכה גם אֶחָינו החכם הנעלה מורה הנימנאזיום ומבקר ממשלה מ' ה'ר מ. ס. זאמענהאָף לאי-כבוד „אנא ממדינה השלישית” בגלל „חריצותו היתרה בעבודת המלכות” (за отличную-успешную службу в государственной службе) . איש מופת הוא בכשרונותיו ובמעלות רוחו ויחידי סגולה כמהו מעטים הם, כי בעבודתו הרבה על שדה החכמה והספרות עשה לו את החיל הזה וימינו היא סמכתו לעלות במדרגות התישה ער המקום אשר הוא עומד עליו כעת . בכחני בשתי משרות נכבדות אשר כמהן לא נראה בארצנו על שכם איש מאחינו . גם בין חוברי חברים מחוכמים עשה לו החכם זאמענהאָף שם בחבוריו המועילים שנתקבלו ממעם שר ההשכלה בבה"ם אשר להממשלה וכולם אומרים כבוד למחברים . — בנו בכורו של החכם הזה הוא הרופא הנודע לשם ד"ר ל. זאמענהאָף היושב בעירנו אשר זה מקרוב הגידו בשערים תהלתו ובתו הבכירה , העלמה היקרה בכנות אינוסמא זאמענהאָף, וזכה גם היא למעלה נבונה בהנתן המשרה על שכמה להיות מורה בבית הנימנאזיום כאשר כבר הזכרנו בהצפירה .

Sokolov panegiris sian cenzuriston Mark Zamenhof kaj ties gefilojn Lazarj kaj Avgustina en *Hacefira*, sen scii, ke post kelkaj monatoj li havos novan cenzuriston.

Lejb Citron skribis en *Malantaŭ la kurteno*²⁵, ke Zjusmen multe helpis judajn verkistojn kaj konfidencis al judaj komunumaj aktivuloj la planojn kiujn la Ruslanda registaro havis pri judoj. Sed ankaŭ Citron — same kiel Sokolov kaj Eljaŝeviĉ — skribis, ke Zjusmen estis drinkulo. Laŭ Kac, en rerakonto de Eljaŝeviĉ, Zjusmen pro trodrinkado ofte prespermesis librojn sen legi ilin. La fino de lia kariero en ĈAP metis la ekstreman ortodoksan hebrea verkon *Isur ve-heter he-aruh*, kiun li prespermesis, ne sciante ke ĝi enhavas, inter alie, malpermeson al la judoj estingi incendion en nejudaj domoj sabate kaj aliajn similajn aferojn. Post la maldungo Zjusmen forveturis eksterlanden, ne redoninte al ĈAP kelkajn oficajn dokumentojn²⁶.

Oni scias nenion pri la posta vivo de ĉi Zjusmen, sed supozeble li revenis al Ruslando, ĉar en la reto estas trovebla fragmento de lia artikolo el *Duĥovnyj Vestnik* (1900, №43), en kiu Zjusmen indigniĝas pro disipado de multa mono por kristanigo de duonsovaĝaj popoloj, dum inter la judoj oni tute ne faras kristanan misian laboron.

Tamen nin interesas ne lia zorgo pri (ne)kristanigo de la Ruslandaj judoj, sed lia rolo en la sorto de Mark Fabianoviĉ Zamenhof.

V.

La jaro 1888a komenciĝis tre bone por la 50-jara ŝtatoficisto Zamenhof.

Sokolov la 26an de januaro (la 7an de februaro) 1888 aperigis en *Hacefira* (№22) rimarkindan artikolon.

Varsovio. Estas agrable al ni sciigi, ke inter la ministroj, oficistoj kaj ŝtataj altranguloj, kiuj en la komenco de la nuna kristankalendaraj jaro ricevis ordenojn de nia supera registaro en nia lando, estas ankaŭ nia tre saĝa frato, gimnazia instruisto kaj ŝtata cenzuristo, lia alta moŝto M.F. Zamenhof, kiu ricevis la ordenon “Anna de la tria grado” (за отличную-успешную pro sia granda diligenteco en ŝtata servado службу и особыхъ трудо́въ²⁷). Tiu ĉi kara homo estas modelo pro siaj kapabloj kaj virtoj, kaj malmultaj estas la homoj, kiuj similas al li, ĉar per sia granda laboro sur la kampo de scienco kaj literaturo li akiris ĉi tiun sukceson, kaj lia dekstra mano ebligis al li supreniri la ŝtuparon de la elturniĝemo ĝis la loko sur kiu li staras nun, servante en du altaj postenoj. Tio ĝis nun neniam estis vidata en nia lando sur ŝultro de unu el niaj fratoj.

Ankaŭ inter la aŭtoroj de saĝaj verkoj la saĝulo Zamenhof famiĝis per siaj utilaj verkoj, kiuj estis akceptitaj en ŝtataj lernejoj fare de la ministro pri klerigo, kaj ĉiuj ĉi verkoj donas honoron al ilia verkinto. La plej aĝa filo de tiu ĉi saĝulo estas la fama d-ro L. Zamenhof, nia samurbano, kies gloron oni ĵus disfamiĝis, kaj ankaŭ lia plej aĝa filino²⁸, la plej kara el la junaj virinoj, Ojgusta Zamenhof, akiris altan rangon, ricevinte la postenon de instruistino en gimnazio, kiel ni jam menciis en *Hacefira*.²⁹

Sed jam densiĝis nuboj super la kapo de la “eminenta klerulo”. Ŝanĝiĝis liaj estroj en Peterburgo kaj en Varsovio.

La unuan ŝanĝon ni jam menciis: La 10an de aprilo 1887 anstataŭ Pavel Vasiljeviĉ Margolin en Peterburgo eklaboris Zjusmen. Zjusmen estis malkontenta pri M.F. Zamenhof, kiu en 1887 permesis aperigon de satira poemeto *Ŝtono el la koro* de Abraham Goldfadon en la jidlingva cionisma publikaĵo *Der Jidiŝer Veker* (La Juda Vekanto). Zjusmen atendis taŭgan pretekston por maldungi lin.

La dua ŝanĝo okazis en Varsovio: la 3an de decembro 1887, kiam la 28-jara novedzo Lazarj Zamenhof festis sian 28-jariĝon, ĉesis la preskaŭ 17-jara VCK-prezidado de Nikolaj Ivanoviĉ Ryĵov, la protektanto de M.F. Zamenhof. Kiel la prezidanto ekservis Ivan Konstantinoviĉ Jankulio (1847–1912), kiu antaŭe gvidis la gazetaran fakon ĉe la kancelario de la Varsovia ĝenerala gubernatoro (vi memoras, ke ĉi tiun fakon Emmauskij denunciis pri ĉikanaĉo de VCK).

La duafojan ordenigon (kiu, interalie, altigis lian pension) post kelkaj monatoj sekvis malagrabla okazaĵo.

Unue skribis pri ĝi Maks Levite, filo de Josef kaj Rozalja Levite (Rozalja estis fratino de Klara Aleksandrovna Zamenhof, do bofratino de Lazarj Markoviĉ Zamenhof):

En unu numero de la “Berliner Tageblatt” aperis anonco pri iuj alkoholaj drinkaĵoj, dirante ke la plej fama aĉetanto de ili estas la tiama caro Aleksandro la Tria. La rusa registaro akuzis la cenzon Zamenhof, ĉar li enlasis tiun anoncon, kiu ofendas la nomon de la caro, en Rusujon. Minacis al li granda puno, kaj por savi lin lia filo Lazaro donis al li la sumon de 5000 rubloj, t.e. proksimume la tutan sian posedaĵon...³⁰

Sekve de tiu “ofica peko” M.F. Zamenhof estis maldungita el la cenzura komitato.

Maimon malakceptis la version de Levite, ĉar, laŭ li, Zamenhof cenzuris eldonaĵojn jidajn kaj hebreajn, ne germanajn. Maimon ligis la maldungon de Zamenhof kun tiutempa provizora fermo de *Hacefira*. Maimon, esplorante la temon drinkado, trovis en la numeroj №199–200 kaj 202 de *Hacefira* artikolon de J. Frenkel pri malutilo de drinkado por la homo. Laŭ Maimon en la Ruslandaj kondiĉoj la “homo” povus signifi la “caron” kaj do esti taksita kiel ofenda akuzo de la imperiestro pri drinkado, precipe ĉar Zjusmen mem estis drinkema³¹.

Ĉi tiu supozo de Maimon estas malfacile kredebla. Ĉar la eldonado de *Hacefira* estis ĉesigita post №202, aperinta la 13an (25an) de septembro, Josef Ŝemer speciale trarigardis ĝin³² kaj trovis la artikolon pri vino tute sensignifa. Sed sur la unua paĝo de la biblioteka numero, kiun legis Ŝemer, troviĝas

manskribita klarigo pri tio, ke post ĉi tiu numero la eldonado estis portempe malpermesita pro la artikolo pri la morto de la Aŭstria-Hungaria imperiestro Frederiko (№126) kaj pro la artikolo pri judaj komercistoj en Varsovio (№137). Do, ne temas pri kontraŭdrinkada teksto.

Josef Ŝemer atente trarigardis la originalajn hebrelingvajn tekstojn de la verkoj de Sokolov kaj de Ŝmuel Lejb Citron, el kiuj Maimon aperigis fragmentojn, kaj trovis en ili neniun aludon pri drinkemo de la imperiestro, nek pri la kvinmilrubla pago de Zamenhof.

Ankaŭ Sokolov skribis, ke *Hacefira* estis portempe fermita pro la jam menciita artikolo pri konkurenco de judaj komercistoj en Varsovio:

Ĉi tiun demandon ni pritraktis ne pro ia negocata intereso, sed sole por plibonigi la ekonomian staton. La Varsoviaj judoj okupadas sin pri kelkaj gravaj branĉoj, inter ili tiu de teksaĵoj. Tiu branĉo povus flori, povus pli bone efiki ĉe negocistoj, komizoj kaj laboristoj, se ĝi estus submetata al certa regularo, sed la konkurado ne allasis. La judaj komercistoj havis nek kernon de organizo, nek sentis neceson de komuna agado. Kelkaj komercistoj do komencis skribi pri tiu demando. Mi opiniis, ke afero ne koncernanta politikon, religion aŭ la eksteran judan demandon, ne donus pretekston al la cenzuro. Mi tute eraris. Per ia ĵonglado, supera instanco kaptis du malsamajn aferojn, faris konglomeraĵon kaj pruvis, ke per ĉio ĉi oni celas prezaltigon kaj bojkoton kontraŭ la klientaro. Eĉ en sonĝo tia ideo neniam venis al la verkintoj de la nomitaj artikoloj.

Pri tiu ĵonglado mi eksciis post la okazaĵo, post la dekreto. Tio estis en la jaro 1888. Ĉio estis presita kun la permeso de la Varsovia cenzuristo. S-ro Zamenhof ne supozis, ke li permesas krimaĵon. La verkintaj komercistoj, kiuj tiun temon pritraktis, intencis reguligi kaj ordigi la konkuradon inter la judoj, ke ĝi ne estu senbrida, sed estu, ekzemple, kiel la konkurado ĉe la kristanoj — kaj jen venis la dekreto, fermi la gazeton por tri monatoj.

<...>

Kaj la ŝafo por la brulofero — post tiom da klopodoj kaj fina klarigo de la miskompreno — estis S-ro Zamenhof. Kial? Mi tion ne scias ĝis la nuna tago.³³

Resume, la fermon de *Hacefira* kaj la maldungon de Zamenhof kaŭzis ne la artikolo de Frenkel pri drinkado, sed la materialo pri la kunordigendeco de la juda komercado. En ordo, sed restas demandoj:

1. Ĉu Maks Levite fantaziis pri la germana gazeto?
2. Kiam Zamenhof estis maldungita?
3. Ĉu Zamenhof kaj Sokolov pagis koruptaĵon al Zjusmen?

La respondon al la tria demando ni evidente ne povos ekscii, ĉar ne estas imageble, ke ĉi tiu koruptaĵo, se vere donita, estis dokumentita kaj enarkivigita. La respondojn al la unua kaj dua demandoj mi serĉis en RGIA.

VI.

Danke al la “Afero” de Zamenhof ni scias tion, kion Maimon ne sciis. Mark Zamenhof havis en VCK du taskojn: cenzurado de la germana gazeto, venanta poŝte al Varsovio; kaj cenzurado de libroj kaj gazetoj en la hebrea kaj jida lingvoj, presataj en la Vistulaj gubernioj.

En la “Afero” ni trovas du apartajn informojn (ruse “Spravka”):

1. La 21an de majo 1888 M.F. Zamenhof estis liberigita de la cenzurado de germanlingvaj eldonaĵoj, kaj restigita nur ĉe la cenzurado de judaj eldonaĵoj kun nur 500-rubla jarsalajro, anstataŭ la antaŭa 1200-rubla.³⁴

2. La 30an de septembro 1888 M.F. Zamenhof estis maldungita kiel cenzuristo de judaj eldonaĵoj en VCK.³⁵

Montriĝis do, ke pravis kaj Levite pri la artikolo en germana gazeto kaj Sokolov pri la artikolo en *Hacefira* — ambaŭ estis prespermesitaj de M.F. Zamenhof, kaj pro ambaŭ permesoj li suferis. Li estis liberigita de la taskoj en VCK **dufoje**: en majo kiel germanlingva cenzuristo, kaj en septembro kiel cenzuristo en la judaj lingvoj.

Samtempe ni ricevis respondon al la dua demando. Mark Fabianoviĉ Zamenhof definitive forlasis la laboron en VCK la 30an de septembro 1888, sed ne la 12an de decembro 1888 (t.e., la 30an de novembro laŭ la Julia Kalendaro), kiel asertis Holzhaus³⁶.

Kio okazis poste? Nahum Sokolov plu rakontis:

Mi vizitis, kompreneble, S-ron Zamenhof. Li sciis ne pli multe ol mi. Kiel kutime li estis kvieta, laŭetiketa. Nervozecon oni rimarkis sole en tio, ke li fumadis aron da cigaredoj, unu post la alia. “Detalojn mi ne scias — li diris — mi ne scias, kion ili tie volas. Tiu kontrolanto evidente ion volas. Estas necese veturi tien”. Do, ek al Peterburgo!³⁷

Sokolov en plia rakonto (necitita de Maimon, sed retrovita, tradukita kaj resendita al mi de Josef Ŝemer) rakontis pri sia veturado al Sankt-Peterburgo, pri la renkontiĝoj kun Zjusmen (kun interesaj detaloj pri lia biografio, kiujn ŝajne ne konis Eljaŝeviĉ), sed li skribis nur pri siaj klopodoj repermisigi *Hacefira*, nenion pri M.F. Zamenhof, nek pri ties koruptaĵo.

Kion faris la maldungita cenzuristo Mark Zamenhof?..

Eksciinte pri sia maldungo, Mark Zamenhof skribis “humilan peton” al Feoktistov³⁸, kiun vi trovas en la apuda paĝo. (Ŝajnas, ke unuafoje ni povas vidi la manskribon de la patro, kiu estas multe pli klara ol tiu de la filo.)

Sed lia peto ne estis kontentigita. Liajn taskojn ekde la 30a de septembro 1888 ekplenumis eksa Suvalkia rabeno Solomon Osipoviĉ Zeligman (1835–?), sed, kiel Zamenhof skribis al Feoktistov (vidu la suplementon), li ne intencis longe labori en VCK — post sep semajnoj, la 19an de novembro, la verkojn en la lingvoj hebrea kaj jida komencis cenzuri hebrea verkisto Abram Solomonoviĉ Fridberg (1838–1902), kiu dum 1883–1886 redaktis la hebrelingvan gazeton *Hamelic*.

Mark Fabianoviĉ Zamenhof konservis sian ŝtatinstruistan postenon kaj sian nobelecon kaj plu laboris en Varsovio kiel gimnazia instruisto.

Li emeritiĝis dek jarojn poste en la alta ŝtatoficista rango “ŝtata konsilisto” (статский советник), kiu ekvivalentis al la ne plu ekzistanta armea rango brigadira, do inter kolonelo kaj generalo.

Mi dankas al Oksana Burkina, Roy McCoy, Natalja Patruŝeva, Cvi Sadan kaj Josef Ŝemer pro la helpo en la pretigo kaj netigo de ĉi tiu teksto.

Referencoj kaj notoj

1. Privat E. *Vivo de Zamenhof*. 6a eld. Rotterdam: UEA, 2007, p. 26. (Efektive, ĉi tiu eldono estas ne la 6a, sed la 7a.)
2. Korĵenkov A. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009.
3. Sokolov N. *La cenzuristo Marko Zamenhof* / Trad. el la hebrea N.Z. Maimon // *La Nica Literatura Revuo*, 1959, №3, p. 83–89.
4. Maimon N.Z. *La mistero pri la cenzuristo Marko Zamenhof* // *La Nica Literatura Revuo*, 1959, №4, p. 131–140.
5. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978.
6. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1969, p. 7–18.
7. Levite M. *Memoraĵoj pri nia majstro* / Trad. el la hebrea J. Cohen-Cedek // *The British Esperantist*, nov-dec 1952, p. 221–222. (Faksimila represo: *Ludovikologiaj biografietoj* / Komp. Itō Kanzi. Kioto: Ludovikito, 1987, p. 88–89.)
8. Levite M. *Memoro pri mia onklo L.L. Zamenhof* / Trad. el la hebrea N. Havkin // *La Revuo Orienta*, 1957, №4, p. 102–103.
9. Levite M. *Memoraĵoj pri Dro. L.L. Zamenhof* // *Interna Bulteno* [de Palestina Esperanto Ligo], 1944, №1, p. 9–11.
10. La informoj pri VCK estas prenitaj plejparte el la ruslingva studo: Антонов В., Гринченко Н., Измозик В., Патрушева Н. *Материалы для библиографического справочника “Цензоры Российской империи. Конец XVIII — начало XX века”* // *Цензура в России: История и современность*: Сб. научн. трудов. Вып. 4 / Сост. М. Бенина, М. Кошашев, Н. Патрушева. СПб: РНБ, 2008. С. 373–471.
11. Эммаусский Х.В. Из воспоминаний варшавского цензора // *Цензура в России в конце XIX — начале XX века: Сб. воспоминаний* / Сост. Н. Патрушева. СПб: Д. Буландин, 2003. С. 69–70. (Tradukis el la rusa A. Korĵenkov)
12. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 1-2.
13. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 8.
14. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 9.
15. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p. 11.
16. Waringhien G. *1887 kaj la sekvo...* Antverpeno: ТК; La Laguna: J. Régulo, 1980, p. 11–12.
17. Banet-Fornalowa Z. *La familio Zamenhof*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2000, p. 17.
18. *Цензура в России: История и современность*. С. 429.
19. Эльяшевич Д.А. *Правительственная политика и еврейская печать в России, 1797-1917*: Очерки истории цензуры. СПб: Мосты культуры; Иерусалим: Гешарим, 1999. С. 227–228. (Eljaŝeviĉ citas ankaŭ el la studo de Efraim Deinard *Celem behehal* aperinta en 1911 en New Orleans.)
20. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 11об.
21. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 147.
22. Эльяшевич Д.А. *Правительственная политика и еврейская печать в России, 1797-1917*. С. 538.
23. Кас В. *Letoldot hacenzura ŝel hasifrut haiisreelit (Reŝumim vezihronot)* // *Hatoren*, 1923, Vol. 9, 10, 12.
24. Retmesaĝo de Josef Ŝemer, 5 maj 2009.
25. Citron Ŝ. *Meaĥorej ĥapargod: tumarim, bogdim, mitkaĥaŝim*. Vilno, 1924.
26. Эльяшевич Д.А. *Правительственная политика и еврейская печать в России, 1797-1917*. С. 363–364.
27. La rusaj vortoj estas kliŝaj: “pro la perfekta kaj diligenta servado” kaj “pro specialaj taskoj”.
28. Gitla-Avgustina-Aŭgusta-Ojgusta Zamenhof estis je du jaroj kaj duono pli juna ol la plej aĝa filino Fejgla-Fanna/Faina-Fania; vidu la liston de la infanoj en la marta *Ondo*.
29. La Esperanta traduko unue aperis en *Heroldo de Esperanto* (1975, №7), kaj mi uzis ĝin en *Homarano*, sed laŭ mia peto Josef Ŝemer denove tradukis ĝin (intence ne leginte la pli fruan tradukon) kaj Cvi Sadan redaktis ĝin.
30. Levite M. *Memoraĵoj pri Dro. L.L. Zamenhof* // *Interna Bulteno*, 1944, №1, p. 10.
31. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 156.
32. Retmesaĝo de Josef Ŝemer, 7 maj 2009.
33. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 148–149.
34. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 15.
35. Samloke.
36. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p. 12.
37. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 148.
38. РГИА. Ф. 776, оп. 20, д. 582. л. 16–17.

Humila peto

de Mark Zamenhof

Al lia Alta Moŝto
Sinjoro Estro de la Ĉefa
Administrejo pri presaferoj

de la eksa juda
cenzuristo Mark Zamenhof

Humila peto.

La 10an tagon de la nuna oktobro en la Kancelario de la Varsovia Cenzura Komitato oni anoncis al mi, ke sur la bazo de la decido de la Ĉefa Administrejo pri presaferoj, kies gvidado estas al vi komisiita, s-ro Zeligman estas enoficigita anstataŭ mi por la traktado de judaj eldonaĵoj ĉe la Varsovia Cenzura Komitato.

Kvankam ĝis nun mi tute ne scias, en kio nome konsistas mia eraro, kaŭzinta tiel severan kaj rapidan punon, nome: eksigon de mi el la ofico, kiun mi dum 6 jaroj okupis ĉe la Varsovia Cenzura Komitato, mi tute humile akceptis la sorton donitan al mi.

Tamen, konsiderante ke mi jam dum 22 jaroj servas en la kleriga fako, nome: dum 8 jaroj kiel instruisto de judaj studobjektoj en la Ŝtata juda lernejo en la u. Belostoko kaj dum 14 jaroj kiel etata instruisto de la germana lingvo — antaŭe en la Varsovia 1a Vira Progimnazio kaj nun en la Varsovia Reala Lernejo, kaj ke dum la tuta tempo de mia servado mi multfoje ricevis laŭdojn de la lernejaj estraroj, min tre afliktas la penso pri tio, ke mi, tute sen mia kulpo, estas suspektita pri kvazaŭ neglektema rilato al miaj devoj ĉe la Varsovia Cenzura Komitato. — Dum 6 jaroj de mia laboro ĉe la Varsovia Cenzura Komitato mi dum 5 jaroj okupiĝis ankaŭ pri trarigardo de eksterlandaj ĵurnaloj kaj revuoj en la germana lingvo, inter kiuj estis sufiĉe seriozaj eldonaĵoj, ekzemple: Schlesische Zeitung, Kölnische Zeitung, Die Presse, Neue freie Presse, Kladderadatsch, Berliner Wespen, kaj ankaŭ neniam mi ricevis iun ajn mal-laŭdon de la Estraro.

Konsiderante ĉion supre skribitan kaj eksciinte, ke mia posteulo s-ro Zeligman malakceptas la oficon, proponitan al li, mi kuraĝas tre humile peti Vian Altan Moŝton, ĉu ne estus oportune denove enoficigi min ĉe la Varsovia Cenzura Komitato por traktado de judaj

eldonaĵoj, kion mi faris ĝis la 10a tago de la nuna oktobro. Havante jam sufiĉan sperton en la afero de cenzurado, mi esperas, ke ankaŭ en la estonteco mi pli facile restos prudenta, ol iu komencanto, kiu ne povos eviti erarojn, lernante la komplikan taskon nekonatan al li.

Varsovio, la 31an de oktobro 1888
Mark Zamenhof


Tradukis el la rusa
Aleksander Korĵenkov

Notoj de la tradukinto

Ĉi tiu letero estis registrita en la Ĉefa Administrejo pri presaferoj la 4an de novembro 1888, №4927/[1515.]

En la leterosupro estas noto, probable de Feoktistov, kiu legeblas kiel “Proŝu peregovoritj”, t. e.: “Mi petas interparoli pri tio”.

La emfazitaj vortoj pri Zeligman estis substrekitaj en ĈAP; margene apud ili estas du demandosigno.



Poemoj de Gerrit Berveling

Pastoro de la eta eklezio remonstranta, instruisto pri la ŝrumpanta fako “klasikaj lingvoj”, mult-okupa literatoro en la malgranda kulturrondo Esperantuja, la nederlandano Gerrit Berveling figuras grande en nia beletro. Dek kvar jarojn redaktoro de *Fonto*, senlaca produktanto de laŭplane dekvoluma *Latina Antologio*, preleganto, provleganto, predikanto, prezidanto (de E-lingva Verkista Asocio), *arbiter* de eleganto — li estus vera Proteo, se li ne memorigus samtempe ankaŭ Merkurion kaj... precipe Erasmon, kies novtempa reenkarriĝo li probable estas.


Se mi diros ke egala voĉo aŭdiĝas ĉe Berveling prozisto, Berveling poeto, kaj Berveling beletristo ĝenerale — ĉu tio sonos simile al jenaj vortoj de Christian Declerck?

«...lia liriko estas tiel tembunta, tiom stilvaria, diversĝenra kaj diversforma, Biblio-inspirita aŭ idee tendenca, tiel socikritika, movad- kaj kredo-pria, virindefenda, por-okaza aŭ interpersona, kelkfoje pure anekdota aŭ eĉ aforisma, ke la akcento nur escepte kuŝas ĉe *literatura belo*. Ĉefrolas pensoj. Kaj Berveling pensas memstare...»

Jes, penspoeto, menspoeto, *Mensch*-poeto. Unika voĉo.

István Ertl

Foto: Ziko van Dijk



Apolono

Apolon' Muzogvida
Apolon' multfaceta
Apolon' senperea
Apolono eterna!

Kiu rabas el son' la muzikon?
Kiu faras el ruĝo aŭ verd',
ja el freŝa gam' de koloroj
belajn bildoteksaĵojn,
ikonojn, portretojn,
sendivenajn abstraktojn?
Kiu kreas la mondon re?

Apolon' Muzogvida
Apolon' multfaceta
Apolon' senperea
Apolono eterna!

Dafna kien forfadas re? L' arboj
kaŝas ŝian gracion for. Vido
turnu turnu retroen vin! Haltu!
Vin avidas ne mava Di'! Kara!
Dafna cerve galopas plu tra la
ja senlaŭra arbar'. Arbar' laŭra
post nelonge etendos sin, kie
seksperfort' Apolonon presk' — Tamen
restis pura la Dio: lin raŭka
Dafna, kri' senespera, lin savis
Zeŭso: Dafna forfadas re. L' arboj
nun de l' laŭra arbar' al Feb' restos
sanktaj: ĉirkaŭ la kap' girlando jen!

Apolon' Muzogvida
Apolon' multfaceta
Apolon' senperea
Apolono eterna!

Gigantserpento serpentumas
Timigas Delfe
Lin mortigas Apolon'
Pastrinon sidigas
Igas orakoli
Foje gargojle
Foje saĝaĵojn
Foje freneze
Foje stultaĵojn

Naskas idon

Por flegi malsanojn
Fine eĉ la sunon konkeras:
Apolon' ne sin limigas
Por Bakĥo ne cedas

Hera

Hera, bov-okula Diino stranga,
Nura ŝerefiguro kun kokra edzo,
Ĉu eĉ iu iam vin serioze
Prenis? Vi plej famas pro kontraŭulo
Tre impona: ja pro Heraklo kiu
Kreskis laŭstature pro via hato.
Ĉu kun via edzo la nupton ŝirmi?
Ĉu akuŝistino fariĝis vere
Vi, post kiam bebon Hefesto ĵeti
Vi kuraĝis el la Olimpo teren?

Ĉu kulti ĉu ne kulti

Tra la mondo la Di-dekduon daŭre
Ĝiaj neniigintoj plu kultivas.
Estis eĉ profesoro Germana foje,
Fama arkeologo, kiu Zeŭson
Ade alvokis beni la laboron.
Ĉe komplika fosado eĉ la Dian
Gvidon petis li: fari lin klarvida...
Mankis por taŭr-ofero nur financoj,
Ne la em'. Sed dimanĉe ĉi-nunulo
La kristanan preĝejon pie kultis.

Formis Eŭropon...

la instru' gimnazia mortigis
la diojn
ĉar por gimnazia edukateco
unuavice gravas la filologia detal'
laŭ tradici' renesanca,
ne la itala frua renesanco
sed precipe la pliposta
la ĝermana,
la holanda
la germana

nenio plu restis de la praa mistero
nur nova tekstkritika eldon'

Kredu min, sinjorino!

Verki humure ege malfacilas. Aŭtoro de komedioj, dissenditaj en la brita nacia radio BBC iam asertis, ke morti oble pli facilas ol humuri. Kiu scias? Tamen eble li pravis, ĉar malmultas tiuj, kiuj sukcese kontribuis al tiu ĉi plej malfacila ĝenro “humuro”.

Temas efektive pri elito, al kiu en Esperantujo apartenas i.a. Baghy, Beaucaire, Schwartz kaj sendube Cezaro Rossetti, kies sprite suka romano *Kredu min, sinjorino!* ankoraŭ popularas 60 jarojn post publikigo en 1950.

Menciu “Rossetti” kaj, malgraŭ la sukceso de *Kredu min, sinjorino!*, esperantisto pensos pri Reto Rossetti, ne pri la pli aĝa frato Cezaro. Evidente: Cezaro mortis 48-jara en 1950, kompletiginte nur unu romanon; Reto, kontraste, mortis en sia naŭa jardeko, aŭtorinte poemojn, eseojn, novelojn, tradukojn, kaj redaktinte prestiĝajn Esperanto-revuojn. Romanon, tamen, li ne verkis.

Estas interese konsideri, se la krento de *Kredu min, sinjorino!* ne estus mortinta relative junaĝa, ĉu li estus verkinta pliajn romanojn. Se tiel, eble nun oni elspirus unue la nomon de Cezaro, nur due tiun de Reto. Iasence Cezaro Rossetti, kies vivo tro frue estingiĝis, ne permesanta plenan artisman maturiĝon, literature ekivalentas Schubert, ankaŭ superombratan de lia komponista “frato” Beethoven.

Aŭ eble ne. *Kredu min, sinjorino!* prezentas — kiel notas Reto en la enkonduko al la dua eldono de 1974 — aŭtobiografion. Tio signifas, ke Cezaro ĉerpis pli el la memoro, malpli el la imago. Nepre leviĝas la demando, ĉu fakte Cezaro posedis sufiĉan imagopovon por verki malpli faktan, pli fantazian verkon. Ne eblas kun certeco respondi.

Tamen helpas rimarko de Reto en la menciita enkonduko. Malgraŭ tio, ke Cezaro estis “verva, diboĉe amuza rakontisto, kiu sciis sorĉi siajn aŭskultantojn ĝis la kvara matene”, li tamen “abomenis la mekanikan taskon tion skribi ĝis la provoko transmeti ĝin en esperanton lin logis”. Tio sugestas, ke verkado ne aparte plaĉis; ke la lingvo Esperanto pli allogis ol rakontado, almenaŭ en skriba formo. Do eble, eĉ se Cezaro estus pli longe vivinta, *Kredu min, sinjorino!* restus unusola literatura monumento al talenta, sed ĉefe aŭtobiografia, unuromana aŭtoro.

Ĉiaokaze la verko eniris la korojn de



legantoj, kaj ne nur en Esperantujo, ĉar ĝi estas tradukita en la hungaran kaj la japanan. Cetere en 1990 ĝi atingis sian trian eldonon (fenomeno malofta en Esperantujo). *Kredu min, sinjorino!* fariĝis do esperanta klasikaĵo, rekomendita kiel amuza, flua legaĵo por lernantoj.

Samtempe, malgraŭ aŭ eventuale pro sia klasika statuso, ĝi restas io malfacile precizigebla. Geoffrey Sutton, en sia *Konciza enciklopedio pri la originala literaturo de Esperanto*, nomas la verkon “speco de romano ĝis nun unika en Esperanto”. Unika, ĉar temas pri aŭtobiografio ne en la kutima senco: la aŭtoro ne informas ekzemple pri infanaj jaroj, gepatroj, lernejo, sed tuj ensaltas, plenkreskinte, la profesion vivon. Tiam li rakontas, romane; ne raportas, aŭtobiografie. Alivorte: aŭtobiografion li romanigis.

Helpas sendube la ficcia distanco inter verkanto kaj verkato. La romano estas skribita en la “mi”-formo, kvazaŭ parolus la aŭtobiografiisto mem. Tamen ne rolas Cezaro Rossetti, sed bazarulo Vik. La metion “bazarulo” karakterizas Vik jene: “Ordinare li estas kombino de ĉarlatano kaj trud-vendisto, kaj lin interesas nur la tuja vendado. Li uzas ĉiujn rimedojn, esceptinte pafilon, por devigi la interesaton aĉeti”.

Tiu ĉi priskribo prilumas du gravajn aspektojn de la romano kaj parte klarigas ties popularecon. Unue evidentas, ke malgraŭ la aĝo de la libro ĝi ankoraŭ aktualas — eble, en la nuna mono-mondo, eĉ pli, ol kiam ĝi aperis. Ĉirkaŭ vendado, surmerkatego pivotas la intrigo; ĉirkaŭ la ruzoj aplikataj de komercistoj por vendi varojn kaj tiel malplenigi la

monujojn de siaj viktimoj. Bazarulo restas bazarulo, ĉu kolportante sian fatrason, aŭ ĉu ofertante financajn t.n. servojn. Tiamaniere *Kredu min, sinjorino!* ne nur distras, sed ankaŭ informas, helpas kompreni la mondon. *Prodesse et delectare*: instrui kaj agrabli. Jen karakterizaĵo de granda, klasika artaĵo.

La dua aspekto de la romano rekoncible en la citaĵo rilatas al la humuro, kiu trafluas la verkon. Vik informas, ke bazarulo uzas ĉiujn rimedojn por enretigi sian kaptoton, “esceptinte pafilon”. Tuj evidentas la tono de la verko: neniel tro serioza, peza; kaj certe amuza, ridetiga. Ĉi tiun impreson firmigas sekva dialogo. Vik, diskutante kun amiko etimologion, informas, ke *ŝajs* signifas slange malbonega negoco:

“Ĉu *ŝajs* estas latina?”

demandis Ernesto.

“Ne tute,” mi respondis, “ĝi estas ne latina sed pliĝuste ... latrina kaj venas de la germana lingvo”.

Bela, amuza vortludo ... kaj, se tia ne tuj sorĉas leganton, tiu apenaŭ indas nomi sin esperantisto. Tiel la aŭtoro dekomence vekas la intereson de sia publiko — kiel bazarulo.

Tiamaniere, dum Vik transformiĝas de senlaborulo al vendisto de senakva kuirilo, veturante tra la lando — Britujo — de foriro al foriro (kaj brile spegulante en Esperanto la lingvaĵojn de britaj bazaruloj), la leganto lernas pri la vivo de komercisto tia. Ekzemple trejnado: kiam Vik esploras la eblon labori kiel brosvendisto, la kolegoj ekkantas, honore al la varo. Tiel, notas Vik, la franca “marseljezo” fariĝas parodie la “broseljezo”. Abundas scenoj tiaj.

Kaj, se tiom da riĉaĵoj ne sufiĉas, restas Esperanto. Vik, unue skeptika, kredinte la lingvon “morta”, ĝin eklernas. Li rapide komprenas, ke Esperanto estas “vere vivantaĵo, kaj vivantaĵoj oni efektive povas studi ‘dum eterno’ ... ĝi neniam elĉerpiĝas”. Tamen enŝteliĝas satiro. “Nun mi klare vidas, — diras Vik, — ke Esperanto estas mirinda lingvo, per kiu samlandanoj ne povas kompreni unu la alian”.

Kredu min, sinjorino! estas unu el tiuj Esperanto-romanoj (la Schwartz-a *Kiel akvo de l' rivero* estas alia) el kiu eblus krei furor-filmon. Tamen, ĝis mi trovos tempon por verki filmlibron kaj bazarule ĝin oferti al riĉa reĝisoro, nur eblas legi la romanon. Kredu min, gesinjorinoj: vi ne bedaŭros.

Paul Gubbins

Malpli estintus pli

La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin / Red. Detlev Blanke, Ulrich Lins. — Rotterdam: UEA, 2010. — 901 p.

1. La ĝenro

Fest-libroj (D *Festschrift*, termino transprenita ankaŭ en aliajn lingvojn) havas firman tradicion en la ĝerman-lingva sfero akademia. Ilia celo estas omaĝi konatan scienciston, kutime okaze de “(duon)ronda” (60, 65, 70, 75, 80) aniversario. Disĉiploj, amikoj kaj kolegoj kontribuas artikolojn el la fako de la omaĝato. La fest-libroj laŭas striktan skemon: uverturas foto kun subskribo de la jubileulo, sekvas enkonduka eseo (ofte biografia) kaj bibliografio de la publikigaĵoj¹ (ĝi povas laŭokaze situi libro-fine), *Tabula Gratulatoria* (listo de gratulantoj, kutime pli ampleksa ol la listo de kontribuantoj) kaj la kontribuoj mem (kun aŭ sen subdividoj).

Oni kritikis ĉe fest-libroj mankon de selektivo kaj fortan heterogenon, ankaŭ “recikladon” de artikoloj — riproĉoj validaj ankaŭ por la recenzata volumo.

2. Kritiko


Malgraŭ sia firma establiĝo, fest-libroj ne imunas kontraŭ kritiko. La art-historiisto Henry Keazor (Saarbrücken) citas² recenzinton kiu formulis mordan verdikton, nome ke fest-libroj estas obscenaj aranĝoj: oni deklaras iun festo-porko por poste rosti lin surspise³... Pro tempo-lima premo, fest-libroj ofte degeneras al ĝena ritualo⁴. Pro manko de tempo kaj trankvilo multaj fest-libroj pleniĝas per materialo ĉerpita el sliparoj kaj tir-kestoj, cirkonstanco responsa pri la hazardeco de la temoj. Pro tio la teksto-speco “fest-libra kontribuo” malkvalifikiĝas kiel sinonimo de scienca bagateleco.

Ni devas ekzameni, ĉu en la kazo de la tonkinalo ĉi riproĉoj konfirmiĝas.

3. Fest-libroj en Esperantujo

La manko de klerigaj institucioj en la Esperanto-movado kaŭzis i.a. eĉ tion, ke la scienca ĝenro “fest-libro” malfrue establiĝis.

En 1985 mi lanĉis kaj la nocion kaj la ĝenron mem per *Li kaj Ni* (por la 80-jariĝo de G. Waringhien). La ekzemplo imitiĝis:



- 1998 *Menade bal pŭki bal* (Reinhard Haupenthal, 50-jariĝo)
- 1999 *Lingva arto* (William Auld, Marjorie Boulton, 75-jariĝo)
- 2000 *De A al B* (André Albault, 75-jariĝo)
- 2001 *Studoj pri interlingvistiko* (Detlev Blanke, 60-jariĝo)
- 2003 *Klaro kaj Elasto* (Fernando de Diego, 80-jariĝo)
- 2004 *Esperante kaj Ekumene* (Adolf Burkhardt, 75-jariĝo)

Ekster la strikta kadro movada fest-libroj oni dediĉis al konataj esperantologoj/interlingvistoj, i.a. Otto Back, Hermann Ölberg, Fabrizio Pennachietti, sed nur kun “hazardaj” plan-lingvistikaj kontribuoj.⁵ La fest-libro Humphrey Tonkin estas retrofalo en la movadajn dimensiojn. Kvankam Tonkin celebrigis kiel “elstara literatursciencisto” (kun honora doktoreco de Hartford), la nuna fest-libro ne elkreskis sur la fertila grundo de universitata produktivo, sed en areno kie Tonkin rolas divers-funkcie de jam duona jar-cento: la Esperanto-movado, precipe la asocia vivo de TEJO kaj UEA kaj la universalaj kongresoj de ĉi lasta. En ĉi sfero Tonkin estis kaj plu estas speco de faktoto kaj evidente bezonas la banon en la verdaj amasoj...

4. La kontribuintoj

La fakto, ke la redaktoroj, D. Blanke kaj U. Lins, kuntamburis centon da personoj por iel-tiel kontribui, pruvas ĉi konatecon kaj popularon de Tonkin, sed entenas riskon kondensitan en la fama formulo de Grosjean-Maupin: ju pli multaj, des pli stultaj. Tiel trudiĝas la

impreso, ke malpli estintus pli. Sendube tio validas por la tuta bloko X (Anekdotoj kaj rememoroj) kiu impresas kiel ia suplemento de *Adoru*. Sed en sia emo al dikotomio la editoroj volis “ĵeti iom da lumo sur la homon”. Se temus pri hagiografio... Ne eblas listigi ĉiujn aŭtorojn nek ties geografian distribuitecon, sed eble interesos la aĝo-strukturo kiu oscilas inter 1923 (Li Shijun) kaj 1979 (Baláz) jene:⁶

1920-29:	5	1930-39:	27
1940-49:	35	1950-59:	20
1960-69:	10	1970-79:	6

5. La enhavo

La strikta-sencaj kontribuoj dividiĝas en naŭ blokojn: lingvo-politiko kaj lingvo-planado (2), interlingvistiko (3), anekdotoj kaj rememoroj (10). La cetero apartenas al esperantologio, kvankam la redaktoroj apartigas la sekciojn 5 (historio), 6 (movado kaj komunumo), 7 (apliko kaj disvastigo), 8 (literaturo) kaj 9 (strategio), en efektiveco nur disciplinoj de la esperantologio. La ordo ene de ĉi blokoj ne evidentas: supozatan laŭaŭtoran alfabetecon oni ne trovas.

Se ni plu difinas interlingvistikon kiel scienccon de la plan-lingvoj, la artikolo de Vergara falas el ĉi kadro. D. Blanke (la kioman fojon?) prezentas sian dorlot-infanon GIL konfirmante la impreson, ke li parolas *pro domo*. Cetero, la enir-kriterio de GIL ne estas la faka kvalifiko de kandidato, sed ĉu li plaĉas al Blanke. Neniel kompreneblas, ke la kontribuo de W. Blanke jam antaŭe aperis en alia fest-libro (por H. Salvesky, 2004) kaj en ŝia volumo *Esperanto — Terminologie...* (2008). Ankaŭ la artikoloj de C. Gacond (pri CDELI) kaj C. Kiselman (pri hilelismo) jam aperis pli frue kaj ali-loke. Povas esti, ke Tonkin ŝatas revarmigitan gulaŝon, sed kial ŝtopi remaĉaĵon ĉilibren? La s.m. riproĉo pri renversitaj sliparoj kaj tir-kestoj trudiĝas ĉe la bibliografieskaj listoj de Wandel, Chrdle, Barandovská-Frank (p. 221-222 kun kameleonaj Internet-referencoj).

Persone mi legis kun plezuro kaj profito la artikolojn de Chengtai (pri Elpin), Huĝimoto (pri Takasugi Itirō), Lins (pri komunistaj esperantistoj), Minnaja (pri lingvo-kontrolaj institucioj) kaj Ragnarsson (pri la Shakespeare-tradukoj de Tonkin).

Ftize feblas multaj artikoloj, por ekzemplo tiu de W. Bormann kiu

milda-voĉe draŝetas la Civiton sen trafi la kernon de la absurdo. Ĉi taskon neniu kontribuinto kapablis (kuraĝis?) alfronti. La sola kiu povus, fuĝis: Carlevaro. La artikolon de Bormann-filo oni prefero metintus en man-libron por propagandistoj.

Ne eblas ĉi-kadre sublupeigi centon da artikoloj. En sia strebo al vastega aŭtor-gamo la editoroj subfalas la eraron konfuzi kvanton kun kvalito. Lins mem (en iom sinincensa artikolo en *Esperanto* 2010: 2, p. 28) konfesas: “Ni lasis al ili mem kion verki”. La rezulto estas tre sentebla malekvilibro kaj nivel-diferenco. Drasta selekto kaj forrifuzo de straso kaj fatraso aldonintus al la valoro de la verko. Kombini makdonaldismon kun alta gastronomio estas sia-speca kvadratingo de la cirklo...

6. La intervjuo de Fettes

Kerna kaj ŝlosila mozaikero montriĝas la enkonduka “biografia konversacio” (p. 20-43). Ĉi intervjuo de M. Fettes rivelas multon, ne nur pri la rilato Lapenna-Tonkin (kaj inverse). Ia-sence Tonkin estas klonajo de Lapenna: ambaŭ estas uretraj tipoj (se uzi la terminon de Carlevaro) kaj nepraj narcisoj: manko de populareco estus mortiga por ambaŭ. UEA estis/as por ili areno kun publiko (ofte mediokra) tut-monda. Tie ili matadoris kaj nul taŭro potencis sufiĉe por mortigi la matadoron. Kiam Lapenna tamen instinkte rimarkis la alvenon de tia taŭro, li eliris kaj neniam plu revenis: la arenon li forferis al la pulĉinela teatro de NEM. 22 jarojn post sia forpaso li tamen sepultiĝis en flanko navo de UEA...

Detaleto en ĉi intervjuo rivelas la enverguron de la literatura flug-kapablo de Tonkin. Demandite kiun verkon de la lastaj 40-50 jaroj li taksas plej elstara, la ŝekspirologo ne hezitis stultigi sin mem per jena diro: “Mi hontas diri tion, sed *La Litomiŝla tombejo* estas verŝajne inter la plej supraj. Mi hontas diri tion, ĉar subteni Piĉ estas katastrofa pozicio”. Tiel oni kreas sian Salman Rushdie... Ali-flanke la lingva preciozulo Dasgupta finas sian antaŭparolon jene: “Li estas sufiĉe renesanca, ke mi permesas al mi uzi avangarde litomiŝlan sufikson kaj deziri ... feliĉan sepdekjaralon, Humphrey!” (p. 13) Kia katastrofa pozicio!

Nu, pri la povra bengalo Tonkin bon-volas diri jenon: “Sed ni bezonas [literatur-]teoriiston, kiun oni ankaŭ

povas kompreni [...] eble la plej bona maniero havigi al ni tiun teorion estas dresi Probal. Aŭ interpreti lin!” (p. 37) La mulo... lamulo...

7. Resumo

Persone mi ĝojas, ke mia fest-libra iniciato ne perdiĝis ensable. Certe Tonkin ne restos la lasta en la vico.

La arto labori kune (titolo kiu karakterizas pli la stilon de Tonkin ol la esenco de lia verkado) estas krono kunplektita ne nur de fakuloj kaj specialistoj, sed ankaŭ de huraistoj kaj jodluloj. Tiele al la folioj laŭraj almiksiĝis velkaj kaj maldaŭraj. Se tion oni ignoras, restas bela kvanto da atentindaj kaj legindaj artikoloj kiuj gardos aktualon kaj malbanalon. Ili konsistigas la veran valoron sub la stuko. Al ĉi valoro interna aldoniĝas tiu de la fizika libro kiun makulas preskaŭ nul lingva miso nek komposta fuŝo. En neniu ŝranko ĝi manku.

Reinhard Haupenthal

Notoj

1. Pro tio fest-librojn oni konsideras grava fonto por la scienco-historio.
2. Kp. www.sehepunkte.de/2002/10/3517.html en recenzo pri *Ars et Scriptura* (Festschrift für Rudolf Preimesberger. Berlin: Mann 2001. 272 p.)
3. **spiso**: bastono [metala] pinta ĉe unu fino sur kiun oni pikas viandon por rostado kaj turnado [super fajro]; rosto-spiso. Rosti bovon sur spiso. (*A spit*; *D Spieß*; *F broche*; *I spiedo*; *P espeto*, *Io spiso*.)
4. **ritualo**: ripetata, ĉiam sama, regula procedado laŭ fiksita ordo. (La difinoj de *rito* en PIV kaj NPIV estas nek kongruaj nek sufiĉaj.)
5. Iom escepta estas la kvar-voluma fest-libraro por Juan Régulo realigita de la universitato de La Laguna: unu volumo estas dediĉita al “esperantismo”.
6. Brent, Charters kaj Pietrzak (*1944) prisilentas sian aĝon, ĉe Ragnarsson (*1930) forfalis person-indikoj (p. 727).

Ĉi-somere la eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo* planas partopreni en **FREŜO 2010** (Olsztyn, Pollando) kaj en **BET-46** (Visaginas, Litovio).

Bukedo da ĉineskoj

Guozhu. *Poemoj. Volumo de ĉineskoj*: [Elektronika libro]. — Ĉinio: [La aŭtoro], 2010. — 133 p., il.

En la reto aperis nova eLibro *Poemoj* de Guozhu — *Volumo de ĉineskoj*. Oni povas legi aŭ elŝuti ĝin ĉe <http://www.elperno.cn/elibro/gzĉineske.pdf>.

En la volumo estas kolektitaj 180 ĉineskoj — t.e. mallongaj poemetoj ĉinstilaj — en 84 skemoj. Kiujn vers/rim-skemojn konas ordinara poeto aŭ poezi-ŝatanto? Eĉ la plej erudicia apenaŭ nomos pli ol dekon. Soneto, trioletto, rondelo, balado, limeriko, robajo, hajko, tankao... ĉu io plu? Kaj nun imagi, ke en ĉina poezio ekzistas minimume 84 (onidire, kelkcent) diversaj skemoj! Por leganto tio estas malkovro de tute nova nekonata mondo. Do la poemkolekto rekomendindas jam pro tio.

La poemetoj estis verkitaj de Guozhu ekde 1973 ĝis 2009. Ne nur skemoj, ankaŭ la temoj treege varias. De funebra tago pro tertremo ĝis impresoj pri furora filmo; de admiro pro starto de ĉina kosmoŝipo ĝis mond-rekordo pri amasa fikado. Salutoj kaj gratuloj al amikoj vivantaj, rememoroj pri amikoj forpasintaj — eminentaj kaj nekonataj. Eĉ ĉineskaj resumoj de konataj klasikaj poemoj. Kompreneble, multas ankaŭ priskriboj de bela naturo kaj certe ĉe-estas — ja la kolekto estas en Esperanto! — omaĝoj al diversaj movadaj eventoj (iomete pli multaj ol konvenus) kaj ĵuro pri fideleco al memoro de nia Majstro.



La kolekto estas ilustrita per 58 bildoj, inter kiuj estas kaj antikvaj pentraĵoj, kaj modernaj fotoj.

Erarojn mi ne rimarkis — eble pro entuziasma legado. El mankoj menci-eblas nur ne ĉiam bona enpaĝigo, dezirindus havi ĉiun miniaturon sur aparta paĝo, sen rompoj.

Bonŝance, en nia epoko “virtualaj” libroj senprobleme atingebblas por literaturŝatantoj. Do — agrablan legadon!

Valentin Melnikov

Afrika Kompilo aperis!

Jam en 1996 *Vinilkosmo* kunlaboris kun afrikaj artistoj ekzilitaj en Germanio (Denizo Rock Tamba) kaj en Francio (Zhou-Mack). En la dua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'* enestis *La hommaŝino* de la grupo *Afrika Espero* de Dennis Rock-Tamba kaj Louison Yambuka, kaj *Pro viaj faroj* de *FreeMagni-Zhou* la muzika bando de Zhou-Mack.

En 2007 *Vinilkosmo* lanĉis la projekton *Afrika Kompilo* kaj ricevis plurajn reagojn, sed nur malmultaj povis alporti efektive eldoneblajn kontribuojn. La projekto haltis pro manko de rimedoj, malbonkvalita muzikmaterialo, kaj ankaŭ ĉar ĝi startis dum la disko-krizo.

Sed finfine ĝi efektiviĝis danke al *Konga Espero*, kunlaboro inter Mayoma kaj JoMo, kaj kantoj de Dido Fundu el *Vigla Muziko*.

En la kompilo estas: *Kiu lingvo?* (8 titoloj) de *Konga Espero*, Mayoma kun *JoMo Afrikumas* (7 titoloj), kaj 3 titoloj de *Vigla Muziko*. Ili estis miksitaj, maŝigitaj kaj kompilitaj en la Studio de la Trappe/*Vinilkosmo* sur la disko sub la titolo *Afrika Kompilo*, kaj eldonita de *Vinilkosmo*.

Tiu ĉi projekto efektiviĝis danke al internacia solidareco kaj kunlaboro inter artistoj, teknikistoj, grafistoj, produktistoj, kaj subtenaj amikoj el Kongo (Kinŝaso kaj ĉirkaŭaj urboj), Germanio, Hispanio kaj Francio (Donneville, Tournefeuille, Tuluzo, Parizo).

Pri la artistoj pli detale:

KONGA ESPERO

En la komenco de la 1990aj jaroj pluraj Esperanto-artistoj fuĝis el D.R. Kongo al Eŭropo pro la milito. Dennis Rock Tamba kaj Louison Yambuka en Germanio starigis bandon *Afrika Espero*

kiu registris kelkajn kantojn kaj koncertis en KEF 1995 en Kopenhago.

Poste Dennis Rock Tamba preparis kasedan sol-albumon kvintitolan *Afrika Nokto*. En 2004 *La Rolls* nova bando, kiun Dennis Rock Tamba kreis en Germanio, eldonis KD-albumon *Sunradio*. En majo 2005 Denis Rock Tamba estis forpelita de Germanio kun aliaj konganoj post dek ses jaroj de ekzilo, lasinte tie sian filon kaj organizitan vivon.

Post la reveno al Kinŝaso Denis Rock Tamba reaktiviĝis muzike en Kongo kaj renkontis aliajn artistojn. Unue li provis eldoni muzikvideon *Libera*, sed la projekto ne finpretiĝis...

Dum la pasintjara seminario de ILEI en Kinŝaso renkontiĝis Viktor Lufimpu, Junior Ngangu, kaj Denis Rock Tamba, loĝantaj en diversaj lokoj de Kongo, renkontiĝis kaj kreis muzikgrupon *Konga Espero* kun aliaj muzikistoj. Malgraŭ la rimedaj malfacilaĵoj ili sukcesis registri en Kinŝaso oktitolan albumeton *Kiu lingvo?* kaj konsentis eldoni ĝin kadre de *Afrika Kompilo*.

La muzikstilo de *Konga Espero* vojaĝas de regeo kaj zuko tra latina ĝis funk-roko, kun engaĝitaj, pacaj, kaj amtekstoj.

VIGLA MUZIKO

Dido Fundu komencis muziki kaj kanti en la lingvo lingala en 1985 en Mbanza-Ngungu (Malsupra Kongo), kiam li ankoraŭ estis en lernejo. Li faris sian unuan koncerton en la Universitato ISP de Mbanza-Ngungu. Lerninte Esperanton, Dido Fundu ekkantis en la internacia lingvo en 1993 kaj nomis sian grupon *Vigla Muziko*.

Nuntempe la muzikgrupo lokiĝas en Kinŝaso. Estis pluraj provoj inviti *Viglan Muzikon* al Eŭropo okaze de

KEF kaj FESTO, sed ĉiufoje estis malsukceso pro vizoproblemoj. En 2009 *Vigla Muziko* sukcesis veni al Ruslando kaj tie koncerti. Aliaj projektoj estas en atendo... Inter ili, preparo de plena albumo.

Vigla Muziko registris en Kinŝaso kelkajn titolojn el kiuj tri troviĝas en tiu ĉi *Afrika Kompilo*.

MAYOMA

Théophile Mayoma Diankembo naskiĝis la 28an de julio 1960 en Kinŝaso. Mayoma esperantiĝis en 1983. Li ekkantis kaj komencis verki Esperanto-kantojn en 1985. Li neniam kantis en muzika grupo, sed ĉiam kantas sola kaj mem verkas kaj komponas siajn kantojn, sen ludi instrumenton.

Mayoma serĉis artistojn kiuj pretus muzikaranĝi kaj kanti siajn kantojn en la internacia lingvo. Li sendis la tekstojn de siaj kantoj al homoj, Esperanto-grupoj, kaj asocioj por trovi kantiston, sed tio ne sukcesis. Poste li provis registri siajn kantojn surkasede kaj sendis ilin same kiel la tekstojn. En 1987 la usona komponisto David Gaines respondis kaj surbendigis du kantojn kaj sendis ilin al Mayoma surkasede.

Post 1992 Mayoma perdis la kontakton kun David Gaines kaj malsukcese serĉis aliajn artistojn kaj produktistojn. Finfine, en 2006 la tuluzano JoMo (Jean-Marc Leclecq) afable konsentis, kaj komence de 2007 JoMo ekregistris liajn kantojn por la *Afrika Kompilo* de *Vinilkosmo*.

Speciale por tiu ĉi kompilo JoMo komponis la trilingvan kanton *Afriko ne 'stas vendenda* (Esperante), *Africa n'es pas per vénder* (okcitane), *Afrika ezali ya koteka te* (lingale).

Afrukumis por vi *Flo!*



Kio furoris en 2009?

(GK UEA) La ekzerclibreto *Poŝamiko* de B. Allée kaj K. Kovács estis la plej furore vendita libro en la Libroservo de UEA en 2009. Ĝia vendonombro (392) estis preskaŭ duoblo de la klasika lernolibro *Ĉu vi parolas tendare?* de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (213 ekz.), kiu post longa paŭzo regajnis altan lokon dank' al mecenata aĉeto por afrikanoj.

Aparta statistiko pri unuekzempleraj vendoj donas pli nuancitan bildon pri la efektiva populareco de la titoloj en 2009, ĉar la nombrojn de entutaj vendoj ĉefe difinas la kvantaj vendoj de aliaj libroservoj. En la alia statistiko venkis *Esperanto de nivelo al nivelo*, kio elstarigas la sukcesan starton de la novtipaj ekzamenoj de UEA.

La Libroservo vendis sume por 113 298,47 EUR, t.e. je 11 809,15 EUR (9,4%) malpli ol en 2008 (125 107,62). La malkreskon ĉefe klarigas la “kongresa efiko”: en 2008 dum la Roterdama UK la vendoj sumiĝis je 40 504 EUR, sed en Bjalistoko same multe da kongresanoj butikumis por 29 000 EUR (-11 504). Entute la Libroservo vendis 15049 unuopajn librojn aŭ aliajn varojn (13707 en 2008). La nombro de venditaj titoloj estis praktike sama: 2560 anstataŭ 2554 en 2008.

Vendoj entute

<i>Poŝamiko</i> (Beatrice Allée & Katalin Kovács)	392
<i>Ĉu vi parolas tendare?</i> (Renato Corsetti, Mauro La Torre)*	213
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)*	179
<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Márta Kovács)	167
<i>Pocket Esperanto Dictionary</i> (Andrew McLinen)*	121
<i>Monumente pri Esperanto</i> (Hugo Röllinger)*	112
<i>Utila Estas Aliĝo</i> (Ulrich Lins)*	106
<i>Vivo de Zamenhof</i> (Edmond Privat)*	100
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> *	91
<i>Konciza klarigo pri la landnomoj en Esperanto</i> (Anna Löwenstein)	88
<i>Internacia Kongresa Universitato 2009</i> *	78
<i>Faktoj kaj fantazioj</i> (Marjorie Boulton)*	65
<i>Saluton!</i> (Audrey Childs-Mee)*	63
<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> (Wim Jansen)*	62
<i>Elektitaj paroladoj kaj prelegoj</i> (Ivo Lapenna)*	61
<i>Konciza etimologia vortaro</i> (André Cherpillod)*	61
<i>Ŝlosilo angla (A Key to Esperanto)</i>	61
<i>Homarano</i> (Aleksander Korĵenkov)	58
<i>La Zamenhof-strato</i> (Roman Dobrzyński)	58
<i>Malkovru Esperanton</i> (E@I)	53
<i>Komputeko</i> (Yves Nevelsteen)	53

Vendoj unuekzempleraj

<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Márta Kovács)	51
<i>Utila Estas Aliĝo</i> (Ulrich Lins)*	39
<i>Morto de artisto</i> (Anna Löwenstein)	30
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)*	30
<i>Beletra Almanako 4</i>	28
<i>La Asocio</i> (Ziko van Dijk)	27
<i>Homarano</i> (Aleksander Korĵenkov)	25
<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto</i>	25
<i>La origino de specioj</i> (Karolo Darvino)	23
<i>Pasporta Servo, listo de gastigantoj</i> *	23
<i>Beletra Almanako 6</i>	22
<i>Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto</i> (Geoffrey Sutton)	22
<i>Konciza klarigo pri la landnomoj en Esperanto</i> (Anna Löwenstein)	21
<i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> (Bertilo Wennergren)	21
<i>Esperanto estas...</i> (dvd)	20
<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> (Wim Jansen)	20
<i>Esperanto Mini-Course</i>	19
<i>Beletra Almanako 5</i>	18
<i>Konciza etimologia vortaro</i> (André Cherpillod)	17
<i>La ŝtona urbo</i> (Anna Löwenstein)	16
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> *	16

* eldonaĵoj de UEA/TEJO

Spegulo, printempo 2010

La kovropaĝon de la printempa *Spegulo* ornamas desegnaĵo de la pola artisto-esperantisto Andrzej Kołpanowicz.

La redakcia artikolo *Esperanto inter brikaj kaj kanajlaj ŝtatoj* etendas sian analizemon al la tiel nomataj BRIC-ŝtatoj (Brazilo, Ruslando, Barato kaj Ĉinio) kaj tiuj de la Ŝanhaja Koopera Organizaĵo. Temas pri la skeptiko kaj timemo de la Okcidento, pri la sekvoj de la financa krizo, homaj rajtoj kaj la klopodoj de UEA promocii Esperanton en ĉi tiuj landoj. Fine, la redakcio sugestas al UEA “reveni al la racio kaj mediti pri tio, kiuj landoj vere povus esti perspektivaj kiel favorantoj de Esperanto”.

En la nova jarkolekto estas proponata serio da artikoloj pri la situacio en Kubo kaj en aliaj latin-amerikaj landoj kun la celo aktivigi diskuton. Dume mankas al *Spegulo* reeĥo de legantoj.

La unua artikolserio estas *Solidaraj kun Kubo*. Ĝin malfermas artikolo de la iama gvidanto de la pola *Solidarność* kaj la eksa pollanda prezidento Lech Wałęsa, en kiu li asertas, interalie, ke “se mi estus vivanta en Kubo, jam delonge estus okazinta revolucio”. Pri *Mitoj kaj vero pri Kubo de Castro* parolas monda aŭtoritato pri Kubo kaj Latin-Ameriko, Jaime Suchlicki, kuba judo, kiu nelonge studis juron en la Havana universitato kaj migris al Usono kun la familio. En Usono li finis studojn pri historio kaj faris brilan karieron. Sekvas *La pli kaj pli komplika situacio en Latin-Ameriko* de Miriam Leiva kaj *Kie estas la socialismo?* de Oscar Manuel Espinosa Chepe, geedzoj, sendependaj ĵurnalistoj el Kubo.

Andreas Künzli en *Kun firmaj ideoj kaj ardaĵoj diskutoj antaŭen* skizas la historion de UEA per la enhavo de ĝia revuo *Esperanto*.

Per fragmento el *Hunda haŭto* la legantoj konatiĝas kun la albana verkisto Fatos Kongoli, en kies romano disvolviĝas la vivo de averaĝa intelektulo, “granda fuŝulo”. La rubriko *Novaj libroj* detale prezentas la novan volumon de *Interlinguistica Tartuensis*. Gerrit Berveling enkondukas en la mondon de ĉineskoj, recenzante kelkajn poezi-librojn el Ĉinio. Kelkaj poemoj de Anna Aĥmatova tradukitaj de Kris Long aperas kelkloke en la kajero.

Legis por vi **Halina Gorecka**



La februaraĵoj *Malnovaj taskoj* estis tiel malfacilaj, ke venis nur sep respondoj. En ĉiu respondo estis po unu malĝusta solvo, tial venkinto ĉi-foje mankas.

La ĝustaj respondoj estas:

1. Segilo, kombilo, dentrado, kranio, erpilo, posedanto de artefaritaj dentoj
2. Enigmo, peniko, plendo, orgeno
3. Patro, trono, patrono
4. Ganto
5. Sturgo, sturno, turdo
6. Leporo — por + naŭo — aŭ = leono; ardeo — de + sepo — se = apro; lutro — tro + sepo — se = lupro
7. Kaj
8. Gazelo — gazeto, linko — linio, pasero — papero, rano — mano kaj aliaj.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj ke en la kvadratoj 3×3 la nombroj ne ripetigu.

		3			8		5	
				1	9	4		
	5		6	3				
2		1			7			5
9								4
8			2			1		6
				2	4		3	
		2	3	9				
	4		8			9		

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de majo 2010. Bedaŭrinde, foje okazas, ke la ĝustaj solvoj alvenas jam post la limdato, kion kaŭzas malrapida funkciado de la poŝto. Bonvolu ne prokrasti la forsendon de la solvoj.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

Pri kio temas?

Provu diveni, kio ĝi estas:

Karolo Piĉ havis mallongan. Casanova havis sufiĉe longan. Rasputin havis samlongan kiel Casanova.

Eli Urbanová ricevis ĝin de sia edzo. Sed Giorgio Silfer ne sukcesis doni tion al Perla Martinelli.

Viroj normale havas unu por la tuta vivo. Virinoj povas tion ŝanĝi laŭplaĉe.

Ĉinoj ĝenerale havas malpli longajn, ol eŭropanoj.

La Papo havas ĝin, sed ne uzas.

Ĝi estas ... familinomo! Sed ne tio, pri kio vi eble pensis...

Valentin Melnikov

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Buljono-ĉe-Balaton'?

Buljon'. Boulogne. (*Fundamento de Esperanto*. Eldono Hungara. Antwerpen: FEL, 2006, p. 130; erumis Ionel Oneț)

Ĉu en buljonon?

Mi ... klopodos pli aktive enmiksigi UEA-n... (Amri Wandel, <http://www.liberafolio.org/2010/amri-wandel-volas-aktivigi-landajn-asociojn-kaj-varbi-membrojn-en-la-reto>, 10 mar 2010)

Falas ŝu' de l'ĉefŝuisto

Humphrey Tonkin... jam multajn jarojn ... lasas ne forgesblan stampon sur niaj Universalaj Kongresoj, kiel senlaĉa organizanto de pluraj kongrestemaj debatoj... (Amri Wandel, 2 dec 2009, groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4905)

Arabestra aerŝanĝo

Humphrey kaj mi... humure "konkurencis" pri la titolo "plej populara IKU-preleganto" (Humphrey pri Ŝejkspiro kaj mi pri Astronomio)... (Amri Wandel, samloke)

Ĉu skribi aŭ spezi? Aŭ: Kontoj aŭ rakontoj?

Ŝimun Ŝito Āoriae... franciskano, verkisto, psikologo kaj kontaŭtoro... (Ŝimun Ŝito Āoriae. *Nije sve što oči vide // Nokta gardisto*. Zagreb: Kroata Esperanto-Ligo, 2008, p. 225; rimarkis Ionel Oneț)

Vokas voĉ' de Viki-Wales

Bonvolu legi: presonan vokon de la kunfondinto de Vikipedio, Jimmy Wales. ([Eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Komunuma_Portalo](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Komunuma_Portalo), stato 16 dec. 2009; la vokon aŭdis Ionel Oneț)

Mortigu laŭ proceduro, diras la Civito, aŭ: Ne apud la Postdomo!

Se s-ro Tiŝljar... estas juĝenda kaj eventuale ekzekutenda, tion decidos la koncerna statuta instanco, kaj ne la memelektita estro de la sindikato de la forĵetitaj oficistoj, ĉe pendumilo en roterdama postkorto. ("La preferata sporto de certaj finvenkistoj", www.esperantio.net/index.php?id=1181, 19 feb 2010)

Aĥ, ĉi ĉiĉeronaĉ'

Davor Klobuĉar gvidis nin tra la urbo [Osijek] kaj montris al ni la plej interesajn vidindaĉojn. (Danira Grgec. *Renkontiĝo de kroataj esperantistoj en Osijek 2009 // Tempo*, 2009, №4, p. 3; rimarkis Ionel Oneț)

Ĉu rigardi tra-fike?

Mark Twain... ofte vizitis amikojn kaj najbarojn neportante kvaraton. ... Iutage... Mark... sendis [kravaton] al ... najbaro, kun jena noto: "Iom antaŭe mi vizitis vin sen mia kvarato dum ĉirkaŭ unu horo. La mankinta objekto estas jen pakita. Ĉu vi bonvolus ĝin fike rigardi dum 30 minutoj kaj poste redoni al mi?" (*La Lanterno Azia*, jan 2010, p. 17; sendis kaj pakis Ionel Oneț)

Plukis István Ertl

Japanio atendas vin

17–18 apr. **La kunloĝado de Esperanto-Ligo de Kantoo.**

En la Esperanto-domo de Yatugatake (Hokuto-si).

✉ Hori-zonto@water.sanneto.ne.jp

1–5 maj. **La 23a Verda Lernejo.** En Nagano-ken.

✉ esperanto@thn.ne.jp jpesperanto@thn.ne.jp

2–4 maj. **La 43a Esperanto-Seminario.** En Tiba-si.

✉ Esperanto@jei.or.jp

8–9 maj. **La 84a Kongreso en Kjuŝu.** En Kitakyusyu-si.

✉ sed.kibe@com.home.ne.jp

22–23 maj. **La 59a Kongreso en Tokai.** En Aiti-ken.

✉ yamadapiano@mac.com

5–6 jun. **La 59a Kongreso en Kantoo.** En Tokio.

✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp

5–6 jun. **La 58a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo.**

En Nara-si. ✉ nararondo@gmail.com

2–3 okt. **La 74a Hokkajda Kongreso de Esperanto.**

En Sapporo-si.

9–11 okt. **La 97a Japana Esperanto-Kongreso.**

En Nagasaki Brick Hall (Nagasaki-si).

Kongrestemo: *Esperanto ŝanĝas la mondon, ankaŭ vin!*

<http://esperanto.jp/jek10n/eo.html>

✉ jek10n@jei.or.jp

6–7 nov. **La 51a Tohoku-Kongreso de Esperanto.**

En Morioka-si.

6–7 nov. **La 11a Esperanto-Kongreso en Ĉugoku kaj Ŝikoku.** En Higasikagawa-si.

✉ kosaka_kiyoyuki@hotmail.com

festo! Festo!! FESTO!!!



Tuluzo akceptos ĉi somere la internacian renkontiĝon-festivalon **FESTO**, organizatan ĉiujare de la Junulara Esperanta Franca Organizo (JEFO) partnere kun EUROKKA por la arta programo.

FESTO okazos 13–20 aŭg 2010 en la areo de la Universitato Paul Sabatier (sciencia universitato de Tuluzo).

Bona okazo por profiti por paroli kaj praktiki Esperanton kaj renkonti junulojn el diversaj horizontoj en festeca kaj mojosa etoso.

La kultura programo (ankoraŭ provizora) estas alloga kaj varia: Martin kaj la *Talpoj*, *Dolchamar*, *Kaj Tiel Plu*, *Kajto*, la *Pafklik*, JoMo, lokaj kaj okcitanaj bandoj...

Okcitanaj tago estas antaŭvidita kaj diversaj aktivaĵoj kaj distraĵoj (Bicikla ekskurso laŭ la suda kanalo, vizitoj de la rozkolora Tuluzo kaj ĝia bela regiono, Esperanto-kursoj, okcitanaj kaj katalunaj kursoj, kantateliero de *Kajto*, prelegoj kaj diversaj atelieroj...)

Rezervu rapide vian semajnon antaŭ elĉerpiĝo de disponeblaj lokoj.

Informiĝu kaj aliĝu ĉe:

<http://esperanto-jeunes.org/FESTO-2010?lang=eo>

Flo!



Kroatio. La kvaran sinsekvajn fojon la Esperanto-Maskerada Kompanio *Paždoć* ("tohuvabohuo" en la kroata ĉakava dialekto) partoprenis la Internacian Karnavalan Paradon en Rijeka inter centoj da grupoj kun ĉ. 9 mil partoprenantoj. La paradon spektis ĉ. 100 mil urbanoj kaj gastoj. (*Vjekoslav Morankić*)



Indonezio. Ĉi tiu grupo de junaj indonezianoj fotiĝis dum paŭzo en seshora enkonduka kurso de Esperanto, kiun gvidis Heidi Goes (Belgio) en la universitato Gajah Mada en Yogyakarta. Dum sia 18-taga vojaĝo en novembro 2009 ŝi instruis en ses Indoneziaj urboj, al entute ĉ. 500 interesatoj. (*Heidi Goes*)



Hungario. La iniciatintoj de la kurso pri formado de organizantoj de Esperanto-eventoj ĉe la Universitato de Szeged (vd. p. 8) esperas ke la kursanoj baldaŭ organizos programojn en Szeged kaj poste laboros kiel utilaj fakuloj dum multaj movadaj aranĝoj kaj en diversaj Esperanto-centroj. (*Edit Újvári*)

HISTORIO

DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
320 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo